

Enhavo

1	Pasintaj konferencoj	2
1.1	24-a GIL-konferenco en Berlino (21.-23.11.2014)	2
1.2	Pri lingvopolitiko kaj lingvoplanado en Kalgario/Kanado (Humphrey Tonkin)	3
1.3	La 3-a Interlingvistika Simpozio en Poznań, 25.-26.09.2014.....	4
1.4	KAEST 2014 pri bibliotekoj kaj arkivoj.....	6
2	Estontaj konferencoj	8
2.1	Mini-symposium: What future for multilingualism in Europe?	8
2.2	25-a konferenco de “Gesellschaft für Interlinguistik” (GIL) en 2015	9
3	El universitatoj kaj altlernejoj	9
3.1	Honora kolokvo por <i>Heidemarie Salevsky</i>	9
3.2	La MIME-Projekto	9
3.3	Rekorda interesiĝo pri interlingvistiko en Poznano (Ilona Koutny).....	10
3.4	Disertacioj	11
3.4.1	Bakalaŭra laboraĵo de <i>Adelina Solis</i> pri la esperanta komunumo	11
3.4.2	<i>Fabian De Kloe</i> pri planlingvoj komence de la 20-a jarcento	11
3.4.3	<i>Dmitrij Vlasov</i> pri ĵurnalismo kaj Esperanto-movado (Till Dahlenburg).....	12
3.4.4	<i>Anna-Maria Meyer</i> pri slavaj planlingvoj en la Interreto.....	15
4	Bibliografiaj informoj	16
4.1	Aperis la aktoj de la 23-a GIL-konferenco (2013).....	16
4.2	Du libroj de <i>Sabine Fiedler</i> : pri frazeologismoj kaj oftecvortaroj	16
4.3	<i>Klaus Schubert</i> pri senbariera komunikado.....	18
4.4	<i>Michele Gazzola</i> pri lingvopolitika efikeco kaj justeco	18
4.5	<i>Velimir Piškorec</i> amplekse recenzis lingvopolitikan verkon.....	20
4.6	<i>Sebastian Kirf</i> intervjuis <i>Detlev Blanke</i>	20
4.7	Aktuala bibliografio 5	20
4.8	Bibliografioj: “La Oficiala Gazeto Esperantista” kaj artikolaro de UEA.....	27
5	Bibliotekoj	27
5.1	Brokantejoj en la reto	27
5.2	Prelegoj kaj honorigoj en Aalen nun en la reto.....	27
6	Historiistoj malkovras Esperanton (Ulrich Lins).....	28
7	Terminologio.....	30
7.1	Du stipendiuloj de UEA studis terminologion en Vieno	30
7.2	Kristana glosaro Germana-Esperanto de <i>Bernhard Eichkorn</i> (Bernhard Pabst)	30
8	Leksikografio	31
8.1	Grava vortaro de <i>Gaston Waringhien</i> en la reto (Bernhard Pabst)	31
8.2	Granda Vortaro Esperanto-Ĉeĥa de <i>Josef Hron</i> (Bernhard Pabst)	31

9	La Esperanto-Vikipedio sur DVD: pli ol 200 000 artikoloj.....	31
10	Forpasis	31
10.1	<i>Oleg Iljiĉ Krasnikov (1937-2014)</i> (Anatalo Sidorov).....	31
10.2	<i>La volapukisto Arie de Jong (1924-2014)</i> (Reinhard Haupenthal).....	32

1 Pasintaj konferencoj

1.1 24. GIL-konferenco en Berlino (21.-23.11.2014)

La 24-a konferenco de *Gesellschaft für Interlinguistik e.V.* (Societo pri Interlingvistiko, GIL) tradicie okazis en Berlino, de la 21-a ĝis la 23-a de novembro. Partoprenis 33 personoj, inter ili memroj el Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio kaj Nederlando. Oni reelektis la **estraron de GIL**, kiu senŝanĝe konsistas el jenaj sciencistoj:

<i>Prof. Dr. habil. Sabine Fiedler</i> (Univ. Leipzig)	prezidanto
<i>Dr. Cyril Brosch</i> (Univ. Leipzig)	vicprezidanto
<i>PD Dr. Dr. Rudolf Fischer</i> (Univ. Münster)	trezoristo
<i>Dr. habil. Cornelia Mannewitz</i> (Univ. Greifswald)	membro
<i>Prof. Dr. sc. Velimir Piškorec</i> (Univ. Zagreb)	membro

La kadra temo de la faka parto de la konferenco estis „Planlingvo-movadoj ĉirkaŭ la Unua Mondmilito“.

Oni prezentis jenajn prelegojn:

- Dr. James McElvenny (Concord / Aŭstralio): *Plansprachen zur Rettung des Deutschtums*
(planlingvoj por savi la germanan kulturon)
- Dr. Cyril Brosch (Univ. Leipzig): *Esperanto und der 1. Weltkrieg*
(Esperanto kaj la Unua Mondmilito)
- Fritz Wollenberg (Berlin): *"La Rondiranto" – eine handgeschriebene illustrierte Esperanto-Zeitschrift von Berliner Arbeiteresperantisten spiegelt Meinungen zu Krieg und Frieden*
(„La Rondiranto“ – manskribita ilustrita Esperanto-gazeto de laboristaj esperantistoj el Berlino, spegulanta opiniojn pri milito kaj paco)
- Dr. habil. Cornelia Mannewitz (Univ. Greifswald): *Plansprachen und die heutige Friedensbewegung*
(Planlingvoj kaj la nuntempa pacmovado)
- Dr. sc. Detlev Blanke (Berlin): *Stenografie für Plansprachen*
(Stenografio kaj planlingvoj)
- Mag. Bernhard Tuidler (Österr. Nationalbibliothek Wien): *Die Sammlung für Plansprachen und das Esperantomuseum in Wien*
(La Kolekto pri planlingvoj kaj la Esperanto-Muzeo en Vieno)
- Diskuto (Gvidis: Sabine Fiedler): *Interlinguistik und Esperanto an Universitäten, Stand, Ergebnisse und Probleme*
(Interlingvistiko kaj Esperanto en universitatoj – situacio, rezultoj kaj problemoj)
- Prof. Dr. Wim Jansen (Univ. Amsterdam): *Was ist und wozu brauchen wir eine Referenzgrammatik des Esperanto?*
(Kio estas referenca gramatiko kaj por kio ni ĝin bezonas?)

- Bernhard Pabst (Berlin) Esperanto-Lexikographie
 Dr. Cyril Brosch (Univ. Leipzig) *Algari: Vorstellung einer Fantasy-Sprache*
 (Algari: prezento de fantasta lingvo)
 Lic. Kristin Tytgat (Univ. Brüssel) *Eine Sprache, viele Kulturen: Interkulturelle
 Kommunikation auf Esperanto*
 (Unu lingvo – multaj kulturoj: interkultura
 komunikado per Esperanto)
 Dr. Michele Gazzola (Humboldt-Univ. Berlin) *Sprachengerechtigkeit, Multilingualismus und
 Sprachenpolitik in der EU*
 (Lingva justeco, multlingvismo kaj lingvo-
 politiko en Eŭropa Unio)
 Sabine Fiedler (Univ. Leipzig) / Cyril Brosch (Univ. Leipzig), Bengt-Arne Wickström
 (Andrássy-Univ. Budapest/Humboldt-Univ. Berlin)
*Lingua franca und gleichberechtigte sprachliche Kommunikation, Vorstellung des EU-
 geförderten Projektes „Mobility and Inclusion in Multilingual Europe“ (MIME)*
 (Lingua franca kaj samrajteca lingva komunikado, prezento de la projekto „Mobility
 and Inclusion in Multilingual Europe“ (MIME), subvenciita de Eŭropa Unio“)¹

Sebastian Kirf aŭdvide registris la prelegojn. La aktoj aperos en 2015 kiel Beiheft N-ro 22).

1.2 Pri lingvopolitiko kaj lingvoplanado en Kalgario/Kanado

En 4-6 Septembro 2014 en Calgary (Kalgario/Kanado) okazis konferenco pri aliroj al lingvopolitikaj kaj lingvo-planadaj problemoj el diversfakaj vidpunktoj [1]. Temas pri unu el la plej gravaj konferencoj pri tiuj temoj okazanta ĉiun jaron ĉe la Universitato de Kalgario, laŭ la organizo de *Tom Ricento*, eminenta profesoro en ĉi-tiu esplor-areo en la anglalingva scienca medio. Kvar konataj Esperanto-parolantoj prelegis tie: *Mark Fettes*, *Michele Gazzola*, *François Grin* kaj *Humphrey Tonkin*. Do, inter la lingvoj de la kafopaŭzoj kaj lunĉoj, homoj aŭdis ankaŭ flue parolatan Esperanton, kaj por multaj ĉeestantoj temis pri la unua sperto.

Bedaŭre ne estas antaŭviditaj aktoj de la konferenco, kaj pro tio en la sekvo mi prezentas resume la prelegojn de la Esperanto-parolantoj kiuj partoprenis.

La temo de la prelego de *Humphrey Tonkin* tuŝis rekte lingvoplanadon kaj Esperanton, atentigante pri la fakto, ke ĉiuj lingvoj estas iugrade planitaj, kaj aparte gravas rigardi retrospektive al la lingva historio por doni firman grundon kiu subtenas la parolantaron. Tio validas kaj kaze de Esperanto kaj en multaj aliaj kazoj -- ekzemple, siatempe la nederlanda registaro kreis la malajan lingvon je nacia nivelo. Mark Fettes esploris retrospektive la (mal)sukceson de lingvopolitikoj en la lastaj jardekoj, sekvante la uzon de la vorto ‚disvolviĝo‘ en la angla (development): la optimismo de la pioniorj de lingvoplanado, kiel ekzemple *Ferguson* aŭ *Fishman*, finiĝis post kelkaj jardekoj, dum en la 1990aj la ideo de ‚daŭripova evoluo‘ ekmontriĝis.

Kvankam 20 jaroj pasis, multlingvismo ne estas ankoraŭ klara temo en tiu referenckadro. *Michele Gazzola* montris la realan lingvopolitikon de la Eŭropa Komisiono rilate al multlingvismo kaj efikeco en komunikado, difinita laŭ la literaturo kiel procento de celgrupa EU-civitanaro, kiu ne komprenas ajnan oficialan lingvon uzatan por komuniki publike la rezultojn. Fakte la nurangla kaj oligarkia (t.e., la angla plus la franca kaj germana lingvoj) lingvopolitikoj ne estas tiel efikaj, kaj la kostoj de ĉi-tiu malefikeco iras sur la ŝultroj de privataj agentoj, ekzemple kompanioj kaj industrioj.

¹ Pri tio vidu 3.2.

Male al la antaŭaj prelegantoj *François Grin* kaj la aŭtoro prezentis prelegojn kadre de aparta kolokvo, kiu celis prezenti al la esplora komunumo la projekton MIME (Movebleco kaj Inkluziveco en Multlingva Europo) (Vidu 3.3).

László Marác (Universitato de Amsterdamo) malfermis la kolokvon, kiu celis kompari lingvopolitikojn je diversaj niveloj de regado vid' al vide al tutmondighaj fortoj. La unua komuniko estis ĝuste de *François Grin*, kiu esploris la geopolitikajn dimensiojn de lingvopolitiko. La aŭtoro male profundiĝis en la situaciojn de transnacia komunikado (t.e., kie denaskaj parolantoj ne eniras la komunikon) montrante, ke eblas individue kvar niveloj de komunikado, kiu spegulas la kvarnivelan modelon de *De Swaan* kaj *Calvet*: ne nur la angla, do, sed ankaŭ aliaj supernaciaj lingvoj, kiel la franca aŭ la hispana, kaj ankaŭ Esperanto. Dum la konferenco ne okazis aliaj kolokvoj krom tiu ĉi. Menciindas, ke unu prelegantino, *Maartje De Meulder*, estis esploristino pri signolingvoj, kaj por ŝi la organizantoj petis al du interpretistinoj sekvi la tutan konferencon por permesi al ŝi plene partopreni la diskutojn.

Fine, flanke al la konferenco, profitante de la fakto, ke kelkaj prelegantoj ankaŭ membras en CED, okazis CED-kunveno pri diversaj temoj. Partoprenis ĉiuj Esperanto-parolantoj, kaj estris la kunvenon Humphrey Tonkin.

Humphrey Tonkin

[1] La oficiala retejo de la konferenco, en la angla:

<http://werklund.ucalgary.ca/lpp/>

1.3 La 3-a Interlingvistika Simpozio en Poznań, 25.-26.09.2014

La simpozio okazis en la Instituto pri Lingvistiko de la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano/Pollando. Gvidis la simpozion *prof. dr. habil. Ilona Koutny*.

Oni prezentis jenajn prelegojn:

Magdalena Baer: Konsekwencje rozpadu „utopii” językowej – przykład języka chorwackiego po rozpadzie Jugosławii

Marc Bavant: Rezultindika aspekto: Ĉu Esperanto provizus modelon por lingvosciencia analizo?

Magdalena Biegaj: Retoryka polskiej dyplomacji kulturalnej, czyli komunikacja międzynarodowa po polsku

Tomasz Chmielik: Edmond Privat (1889-1962) – la granda forgesito

Aida Čižikaitė: Kontribuo de Ernest Drezen al terminologio-scienco

Ivan Colling: Ĉu la polurita spegulo estas fleksebla kaj amika? Kelkaj konsideroj pri logikeco, reguleco, simpleco en lingvoj

Luíz Fernando Dias Pita: Komparo inter esperanta kaj brazila literaturoj dum la jaroj 1950-1980

Nicolau Dols Salas: Ĉu Esperanto malsamas? Malrigideco aŭ moderneco

István Ertl: Linguistic use and misuse in EU language policy

Michael Farris: The psychological economy of the English language industry

Sabine Fiedler: Oftecvortaroj por Esperanto

Sabine Fiedler: Planned Languages as a Solution to Problems of International Communication: a Review of the Current Specialist Literature

Zbigniew Galor: Internacia komunumo en internacia komunikado

Federico Gobbo: Inventitaj lingvoj en fantascienco: kiuj kaj kiucele?

Mireille Grosjean: Duidiomismo en Afriko

Katarzyna Jopkiewicz: Uwarunkowania kulturowo społeczne a styl tekstów naukowo-technicznych

Eliza Karmińska: Polityka językowa w przekładach literatury dziecięcej na język polski

Barbara Klimek: Trójjęzyczność Bośni i Hercegowiny w polityce i życiu codziennym

Iлона Koutny: Esperanto laŭ la tipologio de naturaj lingvoj

Katalin Kováts: Eduko de plurlingva infano II

Michał Kozicki: Language policy in Ethiopia and the Amharic language

Zsófia Kóródy: Interkultura edukado per internaciaj lernejoj interŝanĝprogramoj

Tatjana Navicka: Model kształtowania oraz przekazania tożsamości narodowej mieszkańców Łotwy na podstawie Długoterminowej Strategii Rozwoju Łotwy do 2030 roku

Piotr Nowak: Językowe aspekty polskiej polityki naukowej. Międzynarodowość i lokalność

Patrycja Obara: Globalizacja a glokalizacja języka angielskiego jako języka nauki, biznesu i nowych technologii

Szymon Pawlas: Pomocnicze pisma logograficzne

Paulo Pereira Nascentes: Paroligante la lernantaron

Jukka Pietiläinen: Kiulingve diverslingvaj eŭropanoj komunikas?

Karolina Pszczoła: Ukraiński? Rosyjski? Surżyk? Polityka językowa na Ukrainie

Krunoslav Puškar: Common criticism of Esperanto: facts and fallacies

Svitlana Romaniuk: Dwujęzyczność na Ukrainie: ‘stary’ problem w obliczu nowych realiów

Witold Sobczak: O statusie językowym i przyszłości Spanglish

André Staes: Simpligita superrigardo de la teorioj pri internaciaj rilatoj

Anja Stecay: Spaco kaj loko kiel verkiloj de la detektiv-romano – kompara analizo de etnolingva kaj esperanta literaturo

Ida Stria: Influence of Esperanto on native languages and vice versa – a research project

Tadeusz Szčerbowski: Kultura a przekład literacki według Ludwika Zamenhofa (La Revizoro)

Szabolcs Szilva: Diversaj aliroj al la klasifiko de planlingvoj

Bernhard Tuidar: La Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Havaĵoj – projektoj – esplorebloj

Kristin Tytgat: Kiel Esperanto povas peri inter kulturoj?

Kinga Uszko: The Welsh fight for the language of their fathers a brief evaluation of language policies concerned with Welsh and bilingualism in Wales

Balázs Wacha: Verboj de movo kaj moviĝo ĉe Zamenhof

Prelegresumoj: <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/interlingvistiko/simpl4programo.html>

1.4 KAEST 2014 pri bibliotekoj kaj arkivoj

La tradicia **Konferenco de Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST)** okazis de 13.-16.11.2014 en la slovaka urbeto Modra-Harmónia ĉe Bratislavo. La kadra temo de la konferenco estis “Bibliotekoj kaj Arkivoj”. Per tiu temo la konferenco daŭrigis la klopodojn savi, gardi kaj sekurigi la nacie kaj internacie gravajn planlingvajn materialojn. Subtemo de la konferenco traktis “Ciferecigo de la Esperanto-Kulturo”. La konferenco denove estis modele organizita kaj fakte ne tre multekosta. Videblis multaj junaj aktivuloj kun konsiderindaj fakscioj. Oni prezentis ĉ. 40 prelegojn. Inter ili ni menciunu tiujn, kiuj rilatis al la kadra temo:

Baláž, Peter: La plej freŝaj aktivecoj de E@I en la kampo de edukado

Blahuš, Marek: Ciferecigo de la Zamenhofaj adresaroj: rezultoj

Blanke, Wera: Antaŭ 3000 jaroj: La arkivo de faraono Eĥnatono

Blanke, Detlev: En Germanio: Esperanto-bibliotekoj kaj arkivoj sub ŝtata protekto

Buijnsters, Petro: - Tekstkontroloj por Esperantotekstoj
- Parolrekonaj sistemoj por Esperanto

Chrdle, Petro: Esperanto-muzeo en Svitavy

Fitzelová, Eva: GLAM-projekto de Vikipedio – Galerioj, Libraroj, Arkivoj, Muzeoj

Kóródy, Zsófia: Ne nur kolekti, sed ordigi! Spertoj de Interkultura Centro Herzberg de la lastaj jaroj

Lindblom, Stella: Arkiva projekto en Svedio
Malovec, Miroslav: Prilaboro de arkivaĵoj

Maradan, Mélanie: - Verki sciencajn artikolojn paŝon post paŝo: enkonduki vian fakon Esperantujen
- Son-prilaborado kaj konservado (plus ciferecigo)

Matúšov, Michal: - Novaĵoj en Vikimedia mondo
- Skanado kaj optika rekonigo (OCR-programoj)

Mueller, Johannes: De papero al ekrano: optika signorekono kaj tekstpurigado

Pachter, Johann: Esperanto-libroj kaj -dokumentoj en publikaj arkivoj kaj bibliotekoj en Germanio

Tiĥomirov, Konstantin: Problemoj de transliterumo kaj latinigo de la rusa lingvo

Tuider, Bernhard: La Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko

Türk, Vladimír: - Ciferecigado de libroj – spertoj pri ABBY FineReader 11 kaj hejma skanado
- Kial kaj kiel uzi Krea Komunaĵon"

Udal Niemann Jan: Arkivado – provo de kreado de manlibro por nefakuloj

Vajs, Ján / Fajth, Lubomír: Slovaka Esperanto-arkivo kaj memoj

Zouzalík, Václav: Interretaj arkivoj

Oni krome prezentis ankaŭ jenajn prelegojn:

David (antaŭnomo?): Pri simetrio de regulaj kaj duonregulaj tridimensiaj korpoj

Derks, Johan: Kiom internacia estas mia vorto?

Dudkowski, Kamil: - Ora Matematiko (pri Ora Proporcio en Arkitekturo, ekonomio, naturo, homo, besto ktp.)
- Slava sanskrito

Kerr, Chris: Malfermaj datoj en natursciencoj

Maitzen, Michael: Esperanto-rilataj objektnomoj en la arkivo de asteroidoj

Mišurec, Vit Guglielmo: Kemio en manĝaĵo – bona aŭ malbona?

Reinvart, Jozef: Nacia Konvencio pri EU: tutsocia diskutplatformo en Slovakio – modelo por EU-membro-ŝtatoj

Tiĥomirov, Marta: Diabeto ĉe malgrandaj bestoj

Vajs, Ján: Grotsistemoj en valoj Demänovská kaj Jánska

(La realigita programo ne tute identis kun tiu anoncita en la retejo:
<http://kaest.ikso.net/pmwiki/pmwiki.php?n=Main.Prelegoj>).

2 Estontaj konferencoj

2.1 Mini-symposium: What future for multilingualism in Europe?

22nd International conference of Europeanists

Paris, France – July 8-10, 2015

Organized by the Council for European Studies, to be held at Sciences Po, Paris.

Conference theme: Contradictions: Envisioning European Futures

Organizers:

Prof. Astrid von Busekist, CERI, Sciences Po.

astrid.vonbusekist@sciencespo.fr

Nuria Garcia, CEE, Sciences Po.

nuria.garcia@sciencespo.fr

Abstract

Since the beginning of the European integration process, the principle of a multilingual language regime for the European community has been enacted by the different member states. In 1958, the European Economic Community adopted a regulation making Dutch, French, German and Italian its official languages. Over the last decades, the subsequent enlargements have led to increase the number of official languages to 24 in order to allow for the EU to communicate directly with its citizens in their own language. Despite the repeatedly renewed commitment to multilingualism expressed by the different European institutions, the increase of the number of official languages has led to strengthen the position of English not only as working language inside the institutions, but also as *lingua franca* allowing communication between the citizens of the different member states.

In the eye of this evolution, our panels seek to address the question of the future for multilingualism in the EU. Bringing together perspectives from different subfields of political science, such as political sociology, public policy analysis, political economy and political theory, presentations will investigate and sketch out the conditions of possibility of maintaining a multilingual language regime in the EU:

What implications does the commitment to multilingualism entail on the level of different policy sectors, such as translation and language education, and in terms of costs?

To what extent does the choice of a multilingual language regime benefit from support by the citizens of the EU and the different political elites?

Panels will more largely seek to organize a lively debate between defenders of multilingualism and supporters of an “English only” – by fact or by choice – language regime.

For all paper proposals, the title of the paper and an abstract (250 words max.) should be submitted to the organizers.

Nuria Garcia

Doctorante / Ph.D. candidate

Centre d'études européennes de Sciences Po

27, rue Saint-Guillaume

75337 Paris Cedex 07

nuria.garcia@sciencespo.fr

2.2 25-a konferenco de „Gesellschaft für Interlinguistik“ (GIL) en 2015

La 25-a Konferenco de GIL ([germana] Societo pri Interlingvistiko) okazos de 13.-15. novembro 2015 en Berlin. Informojn pri loko, aliĝoj, kadra temo kaj kostoj oni baldaŭ trovos ĉe: www.interlinguistik-gil.de.

3 El universitatoj kaj altlernejoj

3.1 Honora kolokvo por *Heidmarie Salevsky*

La 10-an de oktobro 2014 en Humboldt-Universitato de Berlin okazis honora kolokvo por la slavistino d-ro sc. *Heidmarie Salevsky*, profesorino pri translatologio, okaze de ŝia 70-jariĝo (20.08.14). Heidmarie Salevsky dum multaj jaroj instruis kaj esploris en Humboldt-Universitato, poste en la Altlernejo Magdeburg- Stendal. En siaj publikaĵoj la profesorino kelkfoje adekvate traktis la planlingvan demandon, inter alie lige al la eŭropa lingvo-problemo. Ŝi ankaŭ donis eblojn publikigi pri tiuj temoj en siaj libroj kaj por prelegoj kadre de sciencaj aranĝoj organizitaj de ŝi. Pro tio oni ankaŭ invitis du interlingvistojn por kontribui al la kolokvo.

La kolokvo havis la kadran temon „Translatologio kiel interdisciplino“. La 9 prezentitaj prelegoj aperis en jena volumo (+aldona kajero):

Ina Müller (Hrsg. 2014): *Translationswissenschaft als Interdisziplin: Beiträge des Ehrenkolloquiums zum 70. Geburtstag von Heidmarie Salevsky*, Berlin: epubli GmbH, 176 p.

Tie oni trovas ankaŭ jenajn tekstojn:

Blanke, Detlev: „Die Bibel in Plansprachen- eine Skizze“. p. 95-122. (La biblio en planlingvoj – skizo)

Blanke, Wera: „Echnatons Sonnenhymnus und Psalm 104 – Übersetzung, Einfluss, Kontrast?“ p. 122-148 (La sunhimno de Eĥnatono kaj psalmo 104 – traduko, influo, kontrasto?)

Ĉiujn prelegojn oni registris sur 4 DVD-oj. Informojn donas detlev@blanke-info.de.)

3.2 La MIME-Projekto

Pri la MIME-projekto oni legas en la reto:

„MIME estas esplorprojekto pri multlingveco en Eŭropo, financata per la 7-a Kadra Programo de la Eŭropa Komisiono. Uzante novigan interdisciplinan aliron, MIME generos kompleksan aron de politike gravaj proponoj determinante la prilingvajn politikojn kaj strategiojn kiuj plej bone kunigas ‘moveblecon’ kaj ‘inkluzivecon’. La diversaj konceptoj kaj metodoj estas kombinitaj en analiza kadro destinita por certigi ilian integradon praktike orientitan.

MIME determinas, prijuĝas kaj rekomendas rimedojn por direktadi la ekvilibrigadon de la potenciale kontraŭaj celoj de movebleco kaj inkluziveco en multlingva Eŭropo. Ni konsideras la ekzistantajn formojn de ekvilibrigo ne memkompreneblaj, sed pensas, ke oni povas modifi ilin kaj en simbola kaj en materiala aŭ financa sencoj, kaj ni opinias, ke tiun celon ni povas atingi per publikaj politikoj zorge faritaj kaj per inteligenta uzado de dinamiko en civilsocio.

La projekton partoprenas sciencistoj de 20 Universitaten el 16 landoj.

La *Universitato Leipzig* partoprenas la esplorojn pri la tasko 4.3 (la problemo de *lingua-franca* en Eŭropo).

<http://www.mime-project.org/>

http://www.mime-project.org/our_consortium/?name=ulei .

3.3 Rekorda interesiĝo pri interlingvistiko en Poznano

La 20-an de septembro kun **26 aliĝintoj el 14 landoj** (7 el Brazilo, po 3 el Hispanio kaj Pollando, po 2 el Slovakio kaj Svedio, po 1 el Rusio, Kroatio, Irano, Ĉeĥio, Hungario, Nederlando, Belgio, Francio kaj Granda Britio) restartis la interlingvistikaj studoj de Universitato Adam Mickiewicz, la 6-an fojon ekde 1998. La brazila entuziasmo videble kreskis malgraŭ la granda distanco kaj portis freŝan koloron al la eŭropa paletro. La varbado estis nun pli grandskala, dank'al la paĝaro *edukado.net*, UEA kaj ESF. Ĉi-lastata disponigis bazan stipendion al 13 partoprenantoj. Edukado.net sukcese lanĉis kampanjon por helpi financi la vojaĝkostojn de la partoprenantoj al Pollando. ESF lanĉis subtenkampanjon "AMU Poznanon!" por la sekva semestro (*esperantic.org/amu*), ja la regula partopreno postulas grandan sindediĉon de la gestudentoj.

Dum la semajna intensa sesio de la unua semestro okazis **kurso pri interlingvistiko** kun *Věra Barandovská-Frank* (Germanio, profesoro de AIS) donante superrigardon pri planlingvoj, al kiu kontribuis *Ivan Colling* (el Brazilo), kiu ĵus finis siajn interlingvistikajn studojn ĉe AMU. **Esperantan kulturon** enkondukis *Zbigniew Galor* (prof. de la Universitato de Szczecin, Pollando), al tio adoniĝis interesaj prelegoj pri lingvo kaj kulturo de *Sabine Fiedler* (prof. en la Universitato de Leipzig, Germanio), pri la Esperanto-gazetaro de *Jukka Pietiläinen* (docento en la Universitato de Tampere, Finnlando) kaj pri esperanta radiofonio de *Barbara Pietrzak* (pola retradio, estrarano de UEA).

La unuan periodon de la **Esperanta literaturo** prezentis tradicie *Tomasz Chmielik* (tradukisto, Pollando) kaj *Lidia Ligeza* (poetino el Krakovo, Pollando). **Fonetikon kaj fonologion** – startante de ĝeneralaj bazaj nocioj al karakterizo de esperantaj sonsistemo kaj prononca normo – entreprenis *Ilona Koutny* (gvidanto de la IS, prof. de AMU) kaj *Nicolau Dols Salas* (prof. en la Universitato de la Balearaj Insuloj).

La sesio donis eblecon ankaŭ al la **finaj ekzamenoj de la malnovaj gestudentoj**: 7 persistuloj (3 el Brazilo, po unu el Germanio, Hungario, Litovio kaj Svislando) prezentis interesajn rezultojn de sia laboro: *Ivan Colling*: *Ĉu la polurita spegulo estas fleksebla kaj amika? Kelkaj konsideroj pri logikeco, reguleco, simpleco en lingvoj*; *Guilherme Jardim*: *Analizo de la rilato inter spiritismo kaj esperanto en Brazilo*; *Rita Moraes*: *Du similaj vojoj*; *Anna Christina Stecay*: *Funkcio de kieco en esperantaj krimromanoj*; *Szabolcs Szilva*: *Klasifikado de planlingvoj*; *Snaiguole Malych*: *Ĉu esperantistoj agas inter si alimaniere ol kun neesperantistoj?*; *Mireille Grosjean*: *Komunikado en Afriko*.

La unujaran **instruistan trejnadon** (kunlabore de UAM, ILEI kaj Edukado.net) finis 5 partoprenintoj (2 el Francio, po unu el Germanio, Portugalio kaj Brazilo) kaj akiris ILEI-atestilon pri instruado.

La sesion sekvis la **3-a Interlingvistika Simpozio (25-26.09.2014)**, kun ĉefa temo de *internacia komunikado*. (vidu 1.3).

Ilona Koutny

3.4 Disertacioj

3.4.2 - 3.4.4 estas doktorigaj disertacioj (Red.)

3.4.1 Bakalaŭra laboraĵo de *Adelina Solis* pri la esperanta komunumo

Solis, Adelina (=Adelina Mariflor Solís Montúfar): 2012, *The Contemporary Esperanto Speech Community*. Scripps College, Claremont/Kalifornio (USA), 126 p.

Teksto ĉe: <http://fiatlingua.org/wp-content/uploads/2013/01/fl-000010-01.pdf>

"Adelina Solis received her bachelor's degree in linguistics from Scripps College in 2011. This paper was written as part of her fulfillment of her degree. Since then, she has completed a 10-month term as an English teacher in Vietnam through the Fulbright program. She is fluent in English, Spanish, and Italian, and has studied French, Russian, Vietnamese, and American Sign Language. "
(Laŭ informo de *José Antonio Vergara*).

3.4.2 *Fabian De Kloe* pri planlingvoj komence de la 20-a jarcento

De Kloe, Fabian (2014): *Constructing Worlds With Words: Science And International Language In The Early Twentieth Century*. Faculty of Arts and Social Sciences, Maastricht University.

(Ekspertizantoj: Prof.Dr. ir. Wiebe Bijker; Dr. Geert Somsen, Dr. Nico Randerad)

Abstract

This book zooms in on a remarkable early-twentieth-century case of scientific internationalism: attempts by scientists to create and adopt a scientifically constructed international language. Its central proponents are French mathematician and logician Louis Couturat (1868-1914), German chemist and Nobel Laureate Wilhelm Ostwald (1853-1932), and American chemist and inventor Frederick G. Cottrell (1877-1948). Inspired by contemporary international language projects – most notably Esperanto – each pursued the application of science in the creation and adoption of a new language that guaranteed a smooth, highly efficient transfer of knowledge across national boundaries. Just as Latin facilitated the idealized seventeenth-century Republic of Letters, it was supposed to give rise to a more tightly integrated and harmonious scientific community.

But while Couturat's, Ostwald's, and Cottrell's program appeared to confirm the image of scientists as exemplary internationalists, they were more driven by the push of personal and national agenda's than by the broader pull of international demand. As such, their campaigns served the interests of distinct professional, regional as well as national communities. In fact, their new language not only facilitated a world order that mapped neatly onto regions targeted in the hegemonic and imperial agendas of their respective home nations. The very act of promoting a scientific international language mirrored nationalist agendas on another level. For in doing so, its three proponents copied from nationalists the use of language to construct a shared sense of identity. But instead mobilizing language to construct community on a national level, they did so on an international level.

Kontakto: <http://www.fabiandekloe.bertha.me/>

3.4.3 Disertacio de *Dmitrij Vlasov* pri ĵurnalismo kaj Esperanto-movado

Dmitrij Vlasov en 2011 defendis magistran disertacion². En 2014 sekvis jena doktora disertacio:

Vlasov, Dmitrij (2014): Журналистика российского эсперанто-движения в XX в.: тенденции развития и типологические особенности. Sankt-Petersburger Staats-Universität, Fakultät für Journalismus, 322 S.

Gvidanto: Prof. dr. G. V. Ĵirkov.

(Ĵurnalismo en la Esperanto-movado en la 20-a jarcento: evoluo-tendencoj kaj tipologiaj specifajoj).

La disertacio aperis kiel libro en la eldonejo Impeto (Moskvo: <http://impeto.trovu.com/>):

Vlasov, D[mitrij] V[aler'evič] (2014): Istorija primeneniĵa ĉesperanto v Rossii: pečat', radioveščanie, perepiska, samizdat. Monografija. Moskva: Izdatel'stvo „Impeto“, 404 str. (http://lernolibro.ru/istorija_esperanto_vlasov)

Jen sekvas detala recenzo de la slavisto kaj esperantologo Till Dahlenburg:

Vlasov, D[mitrij] V[aler'evič] (2014): Istorija primeneniĵa Ĉesperanto v Rossii: pečat', radioveščanie, perepiska, samizdat. Monografija. Moskva: Izdatel'stvo „Impeto“, 404 str.

(Vlasov, Dmitrij (2014): Historio de aplikado de Esperanto en Rusio: gazetaro, radioelsendoj, korespondado, „samizdat“. Monografio. Moskvo: Eldonejo “Impeto”, 404 p.)

La monografio priskribas la uzadon de la internacia lingvo Esperanto ekde la jaro 1888 ĝis 1991, t.e. ekde la rifuzita peticio de *L.L.Zamenhof* en Varsovio pri eldono de unua Esperanto-periodaĵo ĝis la disfalo de Sovetunio. La aŭtoro koncentriĝas sur la pli-malpli regule aperintaj publikaĵoj (gazetoj, almanakoj, bultenoj) en tiuj “epokoj” kaj esploras la kaŭzojn, pro kiuj malsukcesis multaj iniciatoj de ruslandaj resp. sovetiaj esperantistoj kaj de iliaj organizaĵoj. Vlasov analizas ankaŭ la Esperanto-aplikadon en la telekomunikado, speciale en la radiofonio, krome li okupiĝas pri tiel nomata movado de laborist-kampanaj korespondantoj (rabel'kory) kaj pri la specifa grupo de t.n. esperkory (esperantistoj- korespondantoj).

La tempo inter la supre markitaj eventoj estas plena da strebadoj, interesigi la ŝtatajn kaj politikajn instancojn pri tiu lingva inventaĵo. Ofte tiaj fortostreĉoj malsukcesis, dum la stalinisma erao ili eĉ kondukis al mortpuno.

Enkondukante en la temaron, Vlasov atentigas pri jam aperintaj fakrilataj sciencaj esploraĵoj, i.a. “La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto” de *Ulrich Lins* (Gerlingen

² La aŭtoro *Dimitrij Valer'evič Vlasov* (1987-) origine studis geologion kaj poste ĵurnalismen en la Ŝtata Universitato de St. Peterburgo. En 2011 li defendis jenan magistran disertacion:

Vlasov, Dmitrij V. (2011): Ĉesperanto: polveka cenzuro. Razvitie ĉesperanto-dviženija i ego ĵurnalistiki v uslovijach cenzury v Rossijskoj imperii i SSSR (1887-1938 gg.) Moskva: Sankt-Peterburga Ŝtata Universitato, ĵurnalistika fakultato. (Pri Esperanto kaj la cenzuro en Rusio kaj USSR 1887-1938.)

Kiel libro la teksto aperis samtitole en Moskvo: Impeto, 182 p.

Pri la aŭtoro vidu: <http://www.impeto.trovu.com/autoroj/vlasov> .

1988); “Historio de Sovetrespublikara Esperantista Unio” de *Oleg Krasnikov* kaj “Historio de Laborista Esperanto-Movado (IPE, EKRELO, Esperanto kaj socialismo)” de *Detlev Blanke* (Moskvo 2008). Sed laŭ lia impresio, en tiuj publikaĵoj la demandoj koncerne la evoluon de la esperantmovada ĵurnalismo ne estas sufiĉe konsiderataj. Li mem antaŭ tri jaroj jam aperigis monografion, dediĉitan al tiu temo, nome “Ĝesperanto: polveka cenzuro. Razvitie ĝesperanto-dviženija i ego ĵurnalistiki v uslovijach cenzury v Rossijskoj imperii i SSSR (1887-1938 gg.)”(Moskva 2011) (Esperanto: Duonjarcento sub la cenzuro. Evoluo de Esperanto-movado kaj ĝia ĵurnalistiko sub cenzuro en Rusia imperio kaj USSR (1887-1938))”.

La scienca valoro de la nova monografio konsistas, laŭ la aŭtoro, en tio, ke estas esplorataj

- 1e: socia movado (ruslanda kaj sovetia) ĝis nun praktike ne analizita;
- 2e: granda kvanto da dosieroj el diversaj arkivoj (pli ol 50 aktaroj);
- 3e: malpli konataj periodaĵoj, eldonitaj fare aŭ helpe de esperantistoj.

Krome unuafoje estas prezentata superrigardo pri la Esperanto-elsendoj en Sovetio.

En kvar ĉapitroj estas prilumata la Esperanto-ĵurnalistiko kaj ĝia rolo lige kun la regantaj politiko-ideologiaj cirkonstancoj: 1888-1917 (Rusia imperio); 1917-1924 (komenco de la soveta reĝimo); 1924-1937 (rabsel’kora movado kaj la likvido de Sovetia Esperanto-Unio); 1956-1991 (specifaĵoj en la evoluo de la sovetia Esperanto-ĵurnalistiko).

La fonto-indiko listigas i.a. leĝdonajn dokumentojn, ŝtatajn dekretojn, arkivojn, periodaĵojn kaj rememoraĵojn. Ampleksaj tabeloj informas pri la Esperanto-periodaĵoj en Rusio kaj USSR (1888-1936), lerte aranĝitaj laŭ jena kategoriigo: periodaĵoj nepermesitaj / ne aperintaj / realigitaj / alinomitaj. El inter la realigitaj projektoj “La Ondo de Esperanto” estis la plej grava kaj plej longdaŭra ĵurnalo (ĝi aperis de 1908 ĝis 1917). Krome ni trovas tabelojn pri presajoj kaj gravaj esperantistaj samizdat-periodaĵoj inter 1957 kaj 1991.

Aparte menciindas la superrigardo pri ruslandaj periodaĵoj aŭ projektoj en aliaj artefaritaj lingvoj, kiel *Idiom-Neutral*, *Reform-Neutral*, *Ido*, *Nepo*. Ekzistas indeksoj de periodaĵoj kaj de personoj, sed ne de temoj kaj de mallongigoj.

Unu el la celoj de la aŭtoro certe estis la sistemigo de la periodaĵoj el la antaŭrevolucia periodo. Tia aranĝaĵo – sur la paĝoj 124/125 – prezentas la periodaĵojn laŭ la sekvaj kriterioj: eldonanto, eldonloko, regiono de disvastiĝo, aper-ritmo, celgrupoj, produktada metodo.

Sur la fono de detaloriĉa analizo de la Esperanto-ĵurnalismo en Rusio / Sovetio estas tuŝata la verŝajne plej decidiga problemo por la mondskala Esperanto-movado: Kion signifas esperantismo? Kiomgrade allaseblas konsideri politik-sociajn kaj ideologi-religiajn cirkonstancojn resp. devigojn por vivteni la movadon, la internacian lingvon? Ĉu la motivado okupiĝi pri Esperanto estas sufiĉe serioza por eviti tute kompreneblan skeptikismon?

Jen kelkaj observoj:

Kiam Zamenhof en 1888 oficiale petis permeson eldoni ĵurnalon „La Internaciulo“, li motivis sian planon per la postulo, ke la internacia lingvo estu praktike testata, ĉu ĝi taŭgus kiel preciza redonilo de la homa pensado kaj ĉu ĝi kapablas anstataŭi aliajn lingvojn (krom la gepatra lingvo!). Nur post tia ekzamenado ĝi povus alporti la atendatan efikecon. Lia peto estis rifuzita pro manko de cenzuristo kapabla kontroli „novinventitajn“ lingvojn.

En la jaro 1908 la Sankt-Peterburga eldonisto *V.V.Bitner* riproĉis al la esperantistoj tro malvastan horizonton pro ilia ekskluziva koncentriĝo pri lingvaj kaj movadaj demandoj, kaj li iniciatis esperantlingvan aldonaĵon al sia ĵurnalo „Vestnik znanija“ („Kuriero de scioj“), en

kiu li volis informi pri sciencaj problemoj, pri demokratiigo de la socio, pri la aliaj popoloj ene de la rusia imperio kaj pri iliaj literaturoj. Sed vane, li ne trovis la necesan subtenon flanke de la esperantistoj.

Nemalgrandajn dubojn pri la kvalitoj de Esperanto nutris esperantistoj mem, ĉar la Ligo de Ruslandaj Esperantistoj asertis, ke Esperanto estas la plej facila, plej bela kaj plej riĉa el ĉiuj lingvoj, kiu estas ellernebla en unu monato sen instruista helpo.

Menciinda iniciato por levi la akceptiĝon de Esperanto en la socio estis la provo instali Esperanton kiel laborlingvon en industri-komerca organizaĵo. Sed senrezulte – la tiucele fondita “Universala ĵurnalo” aperis nur unu fojon, nome en 1910.

La ĵurnalo „Volga Stelo“ proklamis eĉ patriotismajn celojn, kiuj estus atingeblaj pere de la lernado de Esperanto: Tiam aliaj fremdaj lingvoj kiel la angla, franca kaj germana ne povus fariĝi internaciaj komunikiloj.

En la komenca postrevolucia periodo la Esperanto-movado fariĝis politikdestinita, la lingvo devis servi kiel klasbatalilo, kiel komunikilo inter la revoluciemaj samklasanoj en la mondo.

Ekde 1923 ĝis 1937 Esperanto estis utiligata kiel specifa medio por akiri ideologian influon al kapitalismaj landoj: Unue en la historio Esperanto estis superinta sian ekskluzivecon, ĉar ĝi estis politike subtenata. Sed baldaŭ la malkonfido kontraŭ la esperantistoj revenis: La fratino de *Lenin*, *M.I. Ul'janova*, deklaris Esperanton “paliativo”³; al la korespondantoj estis eĉ malpermesite indiki eblan esperantlingvan fonton; la „esperkory“ (esperantistoj-korespondantoj) ricevis ordonojn pri la elektendaj cellandoj kaj pri la plej oportuna maniero de perletera intervjudo.

La jaro 1956 markas ĝeneralan turnopunkton por la ĵurnalistiko en la lando. La t.n. samizdat, la eldonado de ĵurnaloj kaj aliaj presaĵoj per propraj presmaŝinoj signifis vastan ekfloron de alternativa kulturo. La unua periodaĵo de la sovetia reviviĝinta Esperanto-movado estis la almanako “Fajrero de Esperanto” (1957-1968). Aldonita superrigardo pri la unuopaj artikoloj en tiu almanako dum la eldon-periodo listigas i.a. 38 kontribuojn pri lingvistiko kaj interlingvistiko, 18 kontribuojn pri la aplikado de Esperanto ekster Sovetio. En la jaro 1979 oni sukcesis establi Asocion de Sovetiaj Esperantistoj en kadre de Unio de Sovetiaj Societoj de Amikeco, sed la efektive gvidan funkcion okupis ne-esperantisto. Pro tio iniciatoj estis limigitaj. Meze de la 80aj jaroj, sekve de perestrojko kaj glasnosto, kreskis la nombro de esperantrilataj publikaĵoj; la almanako “Impeto” (1989 kaj 1991) kvazaŭ iniciatis la fondon de la samnoma eldonejo. Sub la antaŭrevoluciaj nomoj denove aperis “Ruslanda Esperantisto” (1991-2001) kaj “La Ondo de Esperanto” (ekde 1991).

Vlasov evitas unuflankecon en la prijuĝo de decidoj kaj okazintaĵoj, enŝovas en la tekston ripetigajn partojn, enmetas diversajn dokumentadajn ilustraĵojn. Sur la paĝoj 333-342 estas resumitaj la plej gravaj karakterizaĵoj de la Esperanto-ĵurnalismo (kun radiofonio) ekde la apero de la unua ĵurnalo en Esperanto en Rusia imperio ĝis la 1990aj jaroj. El tiu resumo mi citas nur du konkludojn:

(1) Komence de la XXI-a jarcento la esperantistoj uzas sian internacian lingvon preskaŭ samcele kiel komence de la XX-a jarcento: por interkomunikado inter samideanoj kaj por la propagando de la Zamenhofa projekto.

³ Laŭ NPIV (p. 831): *Kuracilo, kiu provizore malakrigas la malsanon, ne resanigante la malsanulon.*

(2) La Esperanto-movado estis fenomeno de socia reto; tio signifas, ke la hodiaŭaj sociaj retoj havas antaŭulon en formo de la Esperanto-movado.

La teksto de la tre rekomendinda monografio. Tamen en la disertacio mankas la ampleksa tabelo kun rusiaj gazetoj en Esperanto kaj en/pri aliaj lingvo-projektoj (p. 357 – 393).

(Redaktora noto: Vlasov analizis la materialojn nur ĝis 1991. Eble valoras aldoni, ke post 1990 krome aperis “Moskva Gazeto” (1990-1995, eldonita de la eldonejo Impeto). Daŭre aperadas “Rusia Esperanto-Gazeto” [REGO] ekde 2000 kaj “Scienco kaj Kulturo” ekde 1995).

3.4.4 *Anna-Maria Meyer* pri slavaj planlingvoj en la Interreto

Meyer, Anna-Maria (2014): *Wiederbelebung einer Utopie. Probleme und Perspektiven slavischer Plansprachen im Zeitalter des Internets*. (Bamberger Beiträge zur Linguistik 6). Bamberg: University of Bamberg Press, 355 S.

(Ellaborita kaj defendita ĉe: katedro pri slava lingvoscienco.

Gvidantoj: Prof. dr. Sebastian Kempgen, prof. dr. Manfred G. Krug.)

Angla resumo:

Slavic planned languages (also: Slavic artificial or constructed languages) are a field of Slavic linguistics which has not been addressed much in the literature so far. However, projects for a common Slavic language have been existing since the 17th century, from Juraj Križanić’s Ruski jezik (1666) to Arnost Eman Židek’s Slovan (1940), among them also projects which have not yet received any scientific attention.

Currently, the construction of Slavic languages is especially intriguing because it has been living through a small boom since the growing use of the internet in the 1990s. This can particularly be seen from the three very elaborate projects Slovio (1999), Slovianski (2006) and Novosloviensky jezyk (2010).

Apart from embedding them into the historical context of Slavic language construction, these three projects are compared regarding their writing systems, grammars and the composition of their lexicon. Besides, the questions arise whether they can be seen as hints at a new bloom of Pan-Slavism, and which chances for practical use they can be assigned in the context of contemporary European language policy. Theoretically, the study is based both on findings of Slavic linguistics and methods and terminology of Interlinguistics.

(Korektendaĵo

La eldiroj en la teksto sur p. 60 kaj 61 erare estis menciitaj kiel verkitaj de *Heiner Eichner* (Eichner 2012, 29 kaj Eichner 2012, 16). Ilin tamen estis verkitaj de *Reinhard Haupenthal* kaj prenitaj el jena teksto: Haupenthal, Reinhard (2012): „Was ist und zu welchem Zweck betreibt man Interlinguistik?“ In: Kölbl, Andrea P. / Bretz, Jennifer (Hrsg.): Zwischen Utopie und Wirklichkeit. Konstruierte Sprachen für die globalisierte Welt. Begleitband zur Ausstellung an der Bayerischen Staatsbibliothek (14. Juni bis 9. September 2012). München. 11–32.)

<http://opus4.kobv.de/opus4-bamberg/frontdoor/index/index/docId/10020>

(dort: Volltext Dateien herunterladen [Babel6MeyeropusseA1b.pdf](#) (9215 KB))

4 Bibliografiaj informoj

4.1 Aperis la aktoj de la 23-a GIL-konferenco (2013)

Brosch, Cyril / Fiedler, Sabine (Hrsg. 2014): *Interlinguistik im 21. Jahrhundert*. Beiträge der 23. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 29. November – 01. Dezember 2013 in Berlin. Interlinguistische Informationen, Beiheft 21. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 130 p., 10 €.

Enhavo

Cyril Brosch / Sabine Fiedler Einleitung (Enkonduko)

Detlev Blanke Kompetent urteilen? Wege zur Fachinformation über Plansprachen
(Kiel juĝi kompetente? Vojoj al la faka informiĝo pri planlingvoj)

Věra Barandovská-Frank Zu Definitionen von Interlinguistik in Wikipedien
(Difinoj de interlingvistiko en vikipedioj)

Bernhard Pabst Das Fundamento als Maßstab sprachlicher Richtigkeit im Esperanto
(La Fundamento kiel juĝbazo pri lingva ĝusteco de Esperanto)

Kristin Tytgat Brüssel – eine offiziell zweisprachige Stadt, die in der Realität aber vielsprachig ist
(Bruselo –oficiale dulingva urbo, sed reale multlingva)

Kristin Tytgat Mehr Englisch im belgischen Hochschulraum? Neue Sprachanforderungen an die an Hochschulen beschäftigten Lehrer in Flandern
(Pli da angla en belgaj altlernejoj? Novaj postuloj al instruistoj en flandraj altlernejoj pri lingvo-scio)

Rudolf-Josef Fischer Die Bedeutung der Vokale -a-, -i- und -o- in finiten Verbformen und Partizipien des Esperanto
(La signifo de la vokaloj -a-, -i- kaj -o- en finitivoj kaj participoj en Esperanto)

Sabine Fiedler Geschlecht im Esperanto. Eine sprachwissenschaftliche Betrachtung genderspezifischer Bezeichnungen in einer Plansprache
(Sekso en Esperanto. Lingvistika observo de genro-specifaj esprimoj en planlingvo)

Claus Killing-Günkel Sprachschöpfung in der Algebra unter besonderer Berücksichtigung der Koniologie
(Lingvo-kreado en algebro, kun aparta atento al la koniologio)

Über die Autoren / pri la aŭtoroj

Akten der Gesellschaft für Interlinguistik. Beihefte 1 (1996) – 20 (2013) / La aktoj de GIL.

4.2 Du libroj de *Sabine Fiedler*: Pri frazeologismoj kaj oftecvortaroj

La anglistino kaj interlingvistino de la Universitato de Leipzig *prof. Sabine Fiedler* lastatempe publikigis du novajn gravajn librojn:

4.2.1 Anglaj frazeologismoj en la germana

Fiedler, Sabine (2014): *Gläserne Decke und Elefant im Raum – Phraseologische Anglizismen im Deutschen*, Berlin: Logos, 197 p.

Ĉefaj ĉapitroj:

- 1 Einleitung (Enkonduko)
- 2 Phraseologie (Frazeologio)
- 3 Untersuchungen zu englischen Einflüssen auf das Deutsche (Esploroj pri anglaj influoj al la germana lingvo)
- 4 Einflüsse des Englischen auf die deutsche Gegenwartssprache im Bereich der Phraseologie (Influoj de la angla al la frazeologio de la nuntempa germana lingvo)
- 5 Einzeldarstellungen ausgewählter Neophraseologismen (Elektitaj novaj frazeologiaĵoj)
- 6 Auswertungen und Schlussfolgerungen (Resumo kaj konkludo)
Bibliografie (Bibliografio)
Anhang 1: Bild- und Textbelege (Aldono 1: fontoj en ilustraĵoj kaj tekstoj)
Anhang 2: Register phraseologischer Anglizismen (Aldono 2: indekso de frazeologiaj anglismoj)
Sachregister (Temindekso)

4.2.2 Oftecvortaroj

Quasthoff, Uwe / Fiedler, Sabine / Hallsteinsdóttir, Erla (2014, eds.): *Frequency Dictionary Esperanto. Oftecvortaro de Esperanto*. Leipzig: Universitätsverlag, 115 p. + CD.

Ĉefaj ĉapitroj:

- 1 Word forms and their frequencies
- 2 Corpus
- 3 Statistical data on the word list
- 4 References
- 5 Most frequent words ordered by rank
- 6 Alphabetical frequency list

Ĉi-tiu laboraĵo estas parto de la serio “Frequency Dictionaries”, ellaborata de la Universitato de Leipzig.

Pri la serio la eldonantoj informas jene:

Antaŭparolo al la serio

La serio *Frequency Dictionaries* havas la celon disponigi vortarojn kun kompareblaj oftecinformoj por granda nombro da lingvoj. Per enigo al tiu ĉi serio, por multaj lingvoj la unuan fojon ekestas ŝancoj por posedi oftecvortarojn, kiuj uzas vastan empirian bazon. La vortaroj estas haveblaj en presita kaj elektronika versioj. La presitaj vortaroj entenas la plej oftajn

1000 vortformojn aranĝitajn laŭ ofteco kaj ankaŭ la plej oftajn 10 000 vortformojn laŭ alfabeto ordo, krome enkondukas priskribon de la datumoj kaj de la metodika aliro. Aldone estas donataj statistikaj informoj pri uzitaj literoj, vortkonstruoj kaj strukturaj ŝanĝoj en rilato al vortofteco.

La almetita KD enhavas pli ampleksan version de la vortaro forme de elektronika libro kun datumoj pri relativa ofteco de ĝis unu miliono da vortformoj. Por kelkaj lingvoj la listoj estas pli mallongaj pro la reduktita amplekso de la korpusoj. La Esperanta vortlisto por tiu ĉi volumo enhavas 250 000 alfabeto ordigitajn vortformojn. La vortlisto kun oftec-klasoj estas ankaŭ havebla kiel pure teksta dosiero je la KD kaj ordigita laŭ alfabeto kaj laŭ ofteco. El tio facile genereblas listoj por diversaj aplikoj. La vortformoj en la presita vortaro estis zorge kontrolitaj permane por trovi kaj marki erarajn formojn, dume ke la ampleksa listo je la KD estis kontrolita nur per aŭtomataj kredeblecaj kriterioj.

Por la kompilado estis prilaboritaj ampleksaj elektronike riceveblaj fontoj de la *Leipzig Corpora Collection* laŭ unuecaj metodoj. La korpusoj, sur kiuj la oftec-vortaroj baziĝas, konsistas el gazetaraj tekstoj, artikoloj de Vikipedio kaj aliaj hazarde kolektitaj retaj tekstoj. Ili estas alireblaj sub <http://corpora.informatik.uni-leipzig.de/>. Tiu ĉi serio de vortaroj ne nur donas la eblecon studi diversajn aspektojn de vortfarado aŭ de oftec-dependa difinado de leksikaj terenoj por vortaroj kaj fremdlingva instruado rilate al koncerna lingvo, sed ankaŭ ebligas trakti lingvokomparajn demandojn. La statistikaj rezultoj prezentita ĉi tie donas unuan impulson al tiuj esploroj. La titoloj de la oftec-vortaroj ĉiam inkluzivas la nomon de la lingvo en la angla, en la koncerna lingvo mem kaj ankaŭ la triliteran mallongigon laŭ ISO 639-3.

Pri la esperanta parto respondecas *Sabine Fiedler*. La esperantaj *vortformoj* estas *plenaj vortoj* (ekz. laboras, laboraĵo, laborinta, kunlabore ktp.) do ne radikoj.

Pri Esperanto aparte vidu:

http://corpora.informatik.uni-leipzig.de/?dict=epo_mixed_2012

4.3 Klaus Schubert pri senbariera komunikado

Prof. *Klaus Schubert* (Universitato Hildesheim) en kelkaj bazaj publikaĵoj traktis i.a. la optimumigon de lingva komunikado, aparte de la faka. La optimumigo laŭ li povas okazi i.a. per t.n. „kontrolitaj“ aŭ „simpligitaj“ lingvoj.

Ĉi-rilate Schubert ofte mencias ankaŭ planlingvojn kaj tiel atentigas pri la interlingvistika aspekto de la temo. Tio ankaŭ koncernas jenan libron:

Jekat, Susanne J. / Jüngst, Heike Elisabeth / Schubert, Klaus / Villiger, Claudia (2014, Ed.): *Sprache barrierefrei gestalten. Perspektiven aus der Angewandten Linguistik*. Berlin: Frank&Timme, 268 p.

La libro entenas kelkajn ĉapitrojn interesajn ankaŭ por interlingvistoj, i.a. pri tio, kiuj ecoj karakterizas „facilan“ lingvon, kiel eblas plifaciligi la komprenon de lingvaj tekstoj, kiel povas okazi reguligado de lingvoj por teknika dokumentado ktp.

Aparte interesa estas la ĉapitro de Klaus Schubert:

Barrierefrei, reguliert, gelenkt, p. 201-220. (Senbariera, reguligita, direktita [lingvo]). Schubert traktas la diversajn formojn kaj gradojn de la konscia interveno en lingvojn kaj iliajn evoluojn (de „netuŝitaj“ etnaj lingvoj ĝis aprioraj planlingvoj).

4.4 Michele Gazzola pri lingvopolitika efikeco kaj justeco

Antaŭ nelonge *Michele Gazzolas* publikigis sian doktorigan disertacion:

Gazzola, Michele (2014): *The Evaluation of Language Regimes. Theory and application to multilingual patent organisations*. Amsterdam: Benjamins, 380 S.

Jen la angla resumo:

Building on existing analytical frameworks, this book provides a new methodology allowing different language policies in international multilingual organisations (or “language regimes”) to be compared and evaluated on the basis of criteria such as efficiency and fairness. It explains step-by-step how to organise the evaluation of language regimes and how to design and interpret indicators for such evaluation. The second part of this book applies the theoretical framework to the evaluation of the language policy of the Patent Cooperation Treaty (PCT) division of the World Intellectual Property Organisation (WIPO) and the European Patent Office (EPO). Results show that an increase in linguistic diversity of the language regimes of patent organisations can both improve the efficiency of the patent system and lead to a more balanced distribution of costs among countries. This book is a resource for scholars in language policy and planning and for policy-makers in the international and European patent system.

Subjects: Translation studies; Sociolinguistics and Dialectology; Communication Studies; Applied linguistics; Sociology; Industrial & organizational studies; Language policy; Bilingualism

La libro enhavas jenajn ĉefajn ĉapitrojn:

Introduction

Setting the scene: language policy and evaluation

1 The need for evaluation in language policy

Part I. Theory: From economic analysis to multilingual communication

2 The criteria of efficiency and fairness

3 Multilingual communication as an object of evaluation

4 The evaluation process

5 Indicators

Part II. Application to multilingual patent organisations

6 Multilingualism and patents

7 The language regime of the PCT system

8 The language regime of the EPO

Conclusions

9 Summary and perspectives

Annexes and bibliography

Appendices

- 1 Impact of Translation on Patent Creation: Cost-effectiveness Analysis
- 2 Optionals steps in the PCT procedure
- 3 Advantage of the PCT system over the Paris system
- 4 Top 12 PCT applicant countries per field of technology
- 5 List of the EPC contracting states sorted by data of accession

References

Index

PCT = Patent Cooperation Treaty; EPO = European Patent Office; EPC = European Patent Convention.

4.5 *Velimir Piškorec* amplekse recenzis lingvopolitikan verkon

La profesoro pri germanistiko kaj interlingvisto de la Universitato de Zagrebo/Kroatio prezentas nekutime detalan recenzon de grava lingvopolitika verko

Piškorec, Velimir (2014): Rezension zu „Sprachraum Europa – Alles Englisch oder ...?“ (red. Ines-Andrea Busch-Lauer / Sabine Fiedler, 2011, Berlin: Frank & Timme, 183 p.). → *Zagreber Germanistische Beiträge*, Vol.22 No.1 Listopad 2014, 105-134.

Jen la kompleta teksto:

http://hrcak.srce.hr/index.php?show=clanak&id_clanak_jezik=188888

4.6 *Sebastian Kirf* intervjuis *Detlev Blanke*

Sebastian Kirf (2005/2014): Über Plansprachen, Interlinguistik, Esperanto, Sprachpolitik und einige andere Themen. Video-Interview mit Detlev Blanke (Durchgeführt und per Videokamera aufgezeichnet am 09. April 2005 im Interkultura Centro in Herzberg am Harz – die Esperanto-Stadt). Herzberg 2005 / Berlin 2014, 92 p. (Man.).

La 9-an de aprilo 2005 *Sebastian Kirf* intervjuis *Detlev Blanke* en la Interkultura Centro en Herzberg/ĉe Harc-montaro – la Esperanto-urbo.

La intervjuo estiĝis okaze de prelego de D. Blanke pri planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj. Ĝi okazis en leĝera atmosfero, kiu kompreneble influis la stilon de la konversacio. Por ke la teksto estu ankaŭ legebla kaj komprenebla sen neceso spekti la registritan vidbendaĵon bonvenis ioma stila prilaboro. La intervjuito poste donis al la teksto certan fakan bazon en formo de piednotoj kaj literaturaj indikoj. Ili ebligis al la interesato pli profunde okupiĝi pri la temoj, menciitaj en la intervjuo. Kelkfoje necesis certaj klarigoj, foje ankaŭ korektoj. La intervjuo ne pretendas estis sciencnivela. Kiel kutime ĉe intervjuo oni ne atendu kompletajn opini-esprimojn. La enhavtabelo estas dulingva, por ke ankaŭ personoj ne komprenantaj la germanan, povus orientiĝi pri la traktitaj temoj.

Origine oni ne antaŭvidis la surpaperigon de la konversacio. Pasis kelkaj jaroj kaj *Sebastian Kirf* tamen plenskribis la tutan intervjuan teskton, tiel ke eblis produkti ĝin kiel manuskripton. La kvarhora seninterrompa intervjuo estas vidbende komplete registrita kaj disponeblas sur kvar DVD-oj. Ĝi ankaŭ spekteblas en la reto, kvankam en unuopaj relative mallongaj partoj, kio ŝuldiĝas al la teknikajoj de youtube:

<http://bit.ly/blanke-intervjuo>

4.7 Aktuala bibliografio 5

(Kp. la unuajn kvar partojn de la *Aktuala Bibliografio* en IpI 86, 87, 88-89 kaj 90.)

Aarsleff, Hans (1982): "John Wilkins". → Aarsleff, Hans (1982): *From Locke to Saussure. Essays on the Study of Language and Intellectual History*. London, Athlone, 239-277.

Albani, Paolo/ Buonarroti, Berlinghiero (2010): *Dictionnaire des Langues Imaginaires*. Édition française par Egidio Festa avec la collaboration de Marie-France Adaglio (2. eldono). (Trad. de la itala originalo „Aga Magéra Difúra“. Dizionario delle Lingue Immaginarie. Bologna: Zanichelli, 478 p.), Paris: Société d'Édition Les Belles Lettres, 576 p.

Amouroux, Jean (2014): „Koboldaĵoj“. → *Beletra Almanako* 20, 72-83. (pri Esperantaj kabaredoj).

Aray, Başak (2014): „Empirical methods in Language construction“.
→ <http://hiphilangsci.net/2014/03/26/empirical-methods-in-language-construction/>

Astori, Davide (2014): *Esperantaĵoj. Dek ses itineroj esperantologi-interlingvistike* Milano: Federazione Esperantista Italiana, 121 p.

Barandovská-Frank, Věra (2014): „Fakaj tekstoj kaj komunikado en AIS“. → Mihăescu/ Mihăescu 2014, 54-66.

Barandovská-Frank, Věra (2014): „Zu Definitionen von Interlinguistik in Wikipedien“.
→ Brosch, Cyril /Fiedler, Sabine (2014, Hrsg.), *Interlinguistik im 21. Jahrhundert*. Beiträge der 23. Jahreskonferenz der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 29. November – 01. Dezember 2013 in Berlin. Interlinguistische Informationen, Beiheft 21. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 29-44.

Benczik, Vilmos (2014): „Libroeldonado sen mitoj.“ → *La Ondo de Esperanto*, 7/2014, 16-17 (pri la grandega libroproduktado de Hungara Esperanto-Asocio antaŭ 1990).

Benczik, Vilmos (2014): „Libroeldonado sen mitoj. Ne nur en Esperanto“. → *La Ondo de Esperanto*, 11/2014, p. 18 (pri la libroproduktado de HEA antaŭ 1990).

Blanke, Detlev (2014): „Esperanto en GDR kaj aparte en Turingio 1945-1990“. → *Deutscher Esperanto-Bund. 91-a Germana Esperanto-Kongreso. Erfurt, 6.-9.6.2014*. (Kongreslibro), 36-53 (kun biografioj de Alfred Kirchoff [1838-1907], Ernst Beermann [1853-1936], Hans-Joachim Plehn [1905-1985] kaj Karl-Hermann Simon [1930-2011]).

Blanke, Detlev (2014): „Kiel mezuri la gravecon de lingvo?“ → *Internacia Pedagogia Revuo* 44 (2014), n-ro 3, 27-29.

Blanke, Detlev (2014): „Die Bibel in Plansprachen“. → Ina Müller (Hrsg. 2014): *Translationswissenschaft als Interdisziplin: Beiträge des Ehrenkolloquiums zum 70. Geburtstag von Heidemarie Salevsky*. Berlin: epubli GmbH, 95-122.

Blanke, Detlev (2014): „Kompetent urteilen? Wege zur Fachinformation über Plansprachen.“
→ Brosch, Cyril /Fiedler, Sabine (2014, Hrsg.), *Interlinguistik im 21. Jahrhundert*. Beiträge der 23. Jahreskonferenz der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 29. November – 01.

Dezember 2013 in Berlin. Interlinguistische Informationen, Beiheft 21. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 9-28.

Blanke, Detlev (2014): „André Martinet.“→*La Ondo de Esperanto*, 22/2014, p. 19.

Budziak, Renata (2005): „Pioniere der Idee einer Universalsprache.“→Mariola Wierzbicka / Małgorzata Sieradzka / Jaromina Homa (Red.. 2005): *Moderne deutsche Texte. Beiträge der Internationalen Germanistenkonferenz Rzeszów 2004*, Frankfurt/Main u.a.: Peter Lang 115-117.

Buller, Osmo (2014): „Ramstedt, la granda finna esperantisto, lingvisto kaj diplomato.“→*La Revuo Orienta*, 95 (2014), n-ro 1105 (1): 7-11; n-ro 1106(2): 7-9; n-ro 1107 (3):7-9.

Buller, Osmo (2014): „Gustav John Ramstedt.“→*La Ondo de Esperanto*, 12/2014, p. 13.

Chrdle, Petr (2013): *Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj*. Tria komplete novprilaborita eldono. Desegnaĵoj Pavel Rak. Dobřichovice: KAVA-PECH, 97 p.

Cram, David (1983): „Languages universals and 17th century universal languages schemes.“→Klaus D. Dutz / Ludger Kaczmarek (1983, eds): *Reconstruction and Interpretation. Problemgeschichtliche Studien zur Sprachtheorie von Ockham bis Humboldt*. Tübingen: Narr, VI, [351 p.], 243-257.

Cramer, Marcus (2014): „Esperanto kaj sekso“→
[/http://lingvakritiko.com/2014/10/16/esperanto-kaj-sekso/**](http://lingvakritiko.com/2014/10/16/esperanto-kaj-sekso/**))

Degoul, Francisko (2014): „La ideo de frateco ĉe Zamenhof.“→*Sennaciulo*, n-ro 5, (Septembro-Oktobro), 8-13.

Degoul, Francisko (2014): „Transskribo de propraj nomoj helenaj (escepte de nomoj hebredevenaj)“→*Sennacieca Revuo* n-ro 142 (2014), 33-57.

Derks, Johan (2014): „Komparo de derivada sistemo de lando- kaj etnonomoj en kvin lingvoj kun la dukategoria Zamenhofa sistemo.“
→http://lingvakritiko.com/2014/08/29/komparo-de-derivada-sistemo-de-lando-kaj-etnonomoj-en-kvin-lingvoj-kun-la-dukategoria-zamenhofa-sistemo/**)

Derks, Johan (2014): „Kvar ideoj por akordigi -io al -ujo.“
→http://lingvakritiko.com/2014/08/30/kvar-ideoj-por-akordigi-io-al-ujo/**)

Dobrzyński, Roman (2014): „Zenon Klemensiewicz.“→*La Ondo de Esperanto*, 7/2014, p. 19.

Dorren, Gaston (2014): *Lingo. A language spotters' guide to Europe*. London: Profile Books, 304 p. (The no-hoper. Esperanto, p. 240-243. En tiu ĉi ege supraĵa ĉapitro la aŭtoro montras, ke li neniel orientiĝas pri Esperanto kaj ĝia komunumo. Supozeble li ankaŭ ne volis orientiĝi, kiel montras la ege magra bibliografio.)

Fernández, Miguel (2014): „Memore al Juan Régulo Pérez.“→*Beletra Almanako* 20, 67-70.

Fiedler, Sabine (2014): *Gläserne Decke und Elefant im Raum – Phraseologische Anglizismen im Deutschen*, Berlin: Logos, 197 p.

Fiedler, Sabine (2014): „Geschlecht im Esperanto. Eine sprachwissenschaftliche Betrachtung zu genderspezifischen Bezeichnungen in einer Plansprache.“→Brosch, Cyril /Fiedler, Sabine (2014, Hrsg.), *Interlinguistik im 21. Jahrhundert*. Beiträge der 23. Jahreskonferenz der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 29. November – 01. Dezember 2013 in Berlin. Interlinguistische Informationen, Beiheft 21. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 85-106.

Fischer, Rudolf-Josef (2014): „Die Bedeutung der Vokale -a-, -i- und -o- in finiten Verbformen und Partizipien des Esperanto.“→Brosch, Cyril /Fiedler, Sabine (2014, Hrsg.), *Interlinguistik im 21. Jahrhundert*. Beiträge der 23. Jahreskonferenz der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 29. November – 01. Dezember 2013 in Berlin. Interlinguistische Informationen, Beiheft 21. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 69-84.

Gazzola, Michele (2014): “Lingva justeco: kiel taksi ĝin? La ekzemplo de Eŭropa Unio.” → <http://www.unige.ch/traductioninterpretation/recherches/groupes/elf/documents/elfwp14.pdf>

Gazzola, Michele (2014): “Lingva justeco: kiel taksi ĝin? La ekzemplo de Eŭropa Unio.” →Vergara, José Antonio (2014, Red.), *Internacia Kongresa Universitato, 67-a sesio*. Bonaero, 26 julio – 2 aŭgusto 2014, 74-89.

Gazzola, Michele (2014): *The Evaluation of Language Regimes. Theory and application to multilingual patent organisations*. Amsterdam: Benjamins, 380 p.

Gobbo, Federico/ Durnová, Helena (2014): “From Universal to Programming Languages.” 11 p.→ E. Csuhaj-Varjú (ed); *Informal electronic proceedings of CiE 2014*. Budapest: ELTE (<http://hdl.handle.net/11245/1.429278>.)

Gotoo, Hitoshi (2013): “Esperanto en la Moderna Historio de Japanio.”→*Raporto pri Publika Prelegkunveno de la 100-a Japana Esperanto-Kongreso*. Tokio: Japana Esperanto-Instituto (en la japana kaj Esperanto), 4-20.

Göttert, Karl-Heinz (2013): *Abschied von Mutter Sprache. Deutsch in Zeiten der Globalisierung*. Frankfurt/Main: S. Fischer, 368 p. (pri Esperanto p. 228 kaj sekvaj.)

Greatrex, Geoffrey (2014): “Esperanto kaj la Malfrua Antikvo:”→*Beletra Almanako* 20, 94-96.

Gudskov, Nikolao (2014): “Kial kaj kiel verki sciencpopularajn librojn en Esperanto?” →*Sennacieca Revuo* n-ro 142 (2014), p. 27-32.

Hapke, Thomas (2013): “Julius Hanauer: Bio-Bibliographical Traces of a German Special Librarian, Esperantist, and Documentalist”.→*LIBRARYTRENDS*, vol. 62, No 2: 346-359.

Hultgren, Anna Kristina / Gregersen, Frans / Thøgersen, Jacob (2014, eds): *English in Nordic Universities. Ideologies and practices* (Studies in World Language Problems 5, General Editor: Humphrey Tonkin). Amsterdam: Benjamins, 268 p.

Killing-Günkel, Claus (2014): „Sprachschöpfung in der Algebra unter besonderer Berücksichtigung der Koniologie.“→Brosch, Cyril /Fiedler, Sabine (2014, Hrsg.), *Interlinguistik im 21. Jahrhundert*. Beiträge der 23. Jahreskonferenz der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 29. November – 01. Dezember 2013 in Berlin. Interlinguistische Informationen, Beiheft 21. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 107-117.

- Kimura, Goro Christoph (2013): „Esperanto kiel „dialoga ponto“ en la mondo kaj en Japanio.“→ *Raporto pri Publika Prelegkunveno de la 100-a Japana Esperanto-Kongreso*. Tokio: Japana Esperanto-Instituto (en la japana kaj Esperanto), 49-69.
- Kniele, Rupert (2014): *Johann Martin Schleyer (1831 -1912). La inventinto de Volapük. Vivo-skizo*. Okaze de lia centa morto-tago tradukis, prinitis kaj provizis per persona notico pri Rupert Kniele Reinhard Hauptenthal. Bad Bellingen: Edition Iltis, 48 p.
- Krägeloh, Chris / Neha, Tia N. (2014): “Lexical expansion and terminological planning in indigenous and planned languages: Comparison between Te Reo Māori and Esperanto.”→ *Language Problems & Language Planning* 38, 1: 59-86.
- Kück, Andreas (2014): Oficialaj lingvoelementoj de Esperanto (OLEO). Kun kompilaĵo de tiuj de la Oficialaj Aldonoj 1 ĝis 7. 2-a eldono. Rechtenfleth: Kück, 93 p.
- Künzli, Andreas (2014): “100 jarojn post la morto de Louis Couturat (1868-1914) laŭ Louis de Beaufront.”→*Svisa Esperanto-Societo informas*, 4/2014, 25-29.
- Lang, Sonja / Blahuš, Marek (2014): *toki pona en 76 ilustritaj lecionoj*. Dua eldono. Trad. en Esperanto Marek Blahuš. Partizánske: Espero, 76 p. + 15 p. Anhänge.
- Libert, Alan (2013): “Theoretical linguistics and artificial languages.”→ <http://hiphilangsci.net/2013/05/29/theoretical-linguistics-and-artificial-languages/>.
- Libert, Alan Reed (2014): “A Survey of Interjections in International Auxiliary Languages.” →*Journal of Universal Language*, Vol. 15, Nr. 1 (March), p. 79-103. (Pri la revuo *Journal of Universal Language* vidu: www.unish.net).
- Lins, Ulrich (2013): “La kontribuo de japanoj al la monda Esperanto-Movado.”→*Raporto pri Publika Prelegkunveno de la 100-a Japana Esperanto-Kongreso*. Tokio: Japana Esperanto-Instituto (en la japana kaj Esperanto), 21-48
- Lipari, Michela / Tonkin, Humphrey k.a. (2014 Red.): *Belarta rikolto*. (Premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio). New York: Mondial, 61 p.
- Lobin, Günter (2014): “Zur Vita Helmar Frank.”→ *Mihăescu/ Mihăescu* 2014, 4-13.
- Lobin, Günter (2014): „Propädeutik für den Fremdsprachenunterricht.“→ *Mihăescu/ Mihăescu* 2014, 175-181.
- Löwenstein, Anna (2014): “Marjorie Boulton: trezoro de nia movado.” →*Esperanto* vol. 107 (2014) 6:140-141.
- Luciano, Erika (2012): “Peano and His School Between Leibniz and Couturat: The Influence in Mathematics and in International Language.”→ R. Kröner/C.D. Yannick (Hrsg. 2012), *New Essays in Leibniz Reception*. Basel u.a.: Birkhäuser, 41-64.
- Maradan, Mélanie (2014): “Helpilo por verki sciencajn artikolojn.”→*Scienca Revuo* vol. 64, n-ro 2, 89-94.
- Meyer, Anna-Maria (2014): *Wiederbelebung einer Utopie. Probleme und Perspektiven slavischer Plansprachen im Zeitalter des Internets*. (Bamberger Beiträge zur Linguistik 6). Bamberg: University of Bamberg Press, 355 p. (Disertacio)

Michel, Norbert (2011): *Joseph Schipfer 1761-1843. Träumer oder Humanist? Ein Gedenkblatt zum 250. Geburtstag eines vergessenen Plansprachenauteurs.* (Herausgegeben und in einen interlinguistischen Kontext gestellt von Reinhard Haupenthal). Bad Bellingen: Edition Iltis, 33 p.

Mihăescu, Diana/ Mihăescu, Liviu (2014, Hrsg.): *Comunicare și educație transdisciplinară. Komunikado kaj transfaka edukado.* (Internacia Scienca Konferenco, Tria Eldono, 2014). Sibiu: Editura Universității "Lucian Blaga". 241 p.

Minnaja, Carlo (2014): "Al nia kara Geraldo."→*Literatura Foiro* 269: 121-124. (pri Geraldo Mattos).

Minnaja, Carlo (2014): "Intrigoj ĉiutemaj."→*Literatura Foiro* 269: 133-135 (pri Heinrich August Luyken 1864-1947).

Minnaja, Carlo (2014): "Gratulojn, dojenino!"→*Literatura Foiro* 270:177-179 (pri Marjorie Boulton).

Minnaja, Carlo (2014): "Amble kun Juan Régulo Pérez."→*Literatura Foiro*, 270:183-185.

O. A. (2014): „Sprechen Sie Klingonisch?“→ *Österreichische Nationalbibliothek. Magazin* Nr. 2 (November 2014), 26-27.

Pabst, Bernhard (2014): „Das Fundamento als Maßstab sprachlicher Richtigkeit im Esperanto.“→Brosch, Cyril /Fiedler, Sabine (2014, Hrsg.), *Interlinguistik im 21. Jahrhundert.* Beiträge der 23. Jahreskonferenz der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 29. November – 01. Dezember 2013 in Berlin. Interlinguistische Informationen, Beiheft 21. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 45-60.

Pokrovskij, Sergio (2014): „Okazo kaj kazo.“→*La Ondo de Esperanto*, 4-5/2914, p. 16-19; n-ro 6/2014; 16-17, n-ro 7/2914, p. 12-14.

Pokrovskij, Sergio (2014): "Duonvokaloj kaj diftongoj."→
http://lingvakritiko.com/2014/01/21/duonvokaloj-kaj-diftongoj/**)

Pokrovskij, Sergio (2014): "Nombrosistemo por Esperanto."→
http://lingvakritiko.com/2014/04/01/nombrosistemo-por-esperanto/**)

Quasthoff, Uwe/ Fiedler, Sabine /Hallsteinsdóttir, Erla 2014, eds.): *Frequency Dictionary Esperanto. Ofttecvortaro de Esperanto.* Leipzig: Universitätsverlag, 115 p. + CD

Radacsy, László (2014): "Giganta ĉe ni, neglektata ĉe si!"→*Literatura Foiro*, 270:180-182 (pri Sándor Szathmári)

Rizzo, Giancarlo (2011): "A lingua perfetta e la lingua universale nel progetto utopico di Samuel Hartlib."→*Segni e comprensione* 74 (2011): 40-55.

Rousseau, André (2003): "Les avatars des projets de langue universelle au tournant du siècle (1880-1930)."→*Germanica* 33, p. 213-230.

Schubert, Klaus (2014): „Barrierefrei, reguliert, gelenkt.“→Susanne J. Jekat/ Heike Elisabeth Jüngst/ Klaus Schubert/ Claudia Villiger (2004, Hrsg.), *Sprache barrierefrei gestalten.*

- Perspektiven aus der Angewandten Linguistik*. Berlin: Frank&Timme [268 p.], 201-220. (ein Kapitel mit starker interlinguistischer Komponente)
- Standop, Ewald (1987): „Rationale Kommunikation: Eine Einführung in John Wilkins' Universalsprache von 1668.“→*Literatur in Wissenschaft und Unterricht*, 20 (1987), 2-22.
- Stecay, Anina (2014): “La perdita honoro de iu Kleist.”→*Beletra Almanako* 21, 69-79 (Vergleich einiger Übersetzungen einer Novelle von Kleist).
- Szczerbowski, Tadeusz (2014): “Kulturo kaj literatura traduko je la ekzemplo de Ludoviko Zamenhof (*La Revizoro* de Gogol).”→*La Ondo de Esperanto*, 11/2014, 12-15.
- Tišljar, Zlatko (2012): *Ekzistado. Kibernetika klarigado de la mondo*. Zagreb: Izvori, 79 p.
- Tonkin, Humphrey (2014): “Marjorie Boulton, poeto kore fajra.”→*Beletra Almanako* 20, p. 56-66.
- Tonkin, Humphrey (2014): “Tradukado de Soros: la defioj de vivmemoroj.”→ *Beletra Almanako* 21, p. 86-96 (Tradukologia eseo pri al diverslingvaj tradukoj de “Maskerado ĉirkaŭ la morto”).
- Trabant, Jürgen (2014): *Globalesisch oder was? Ein Plädoyer für Europas Sprachen*. München: C.H. Beck, 235 p.
- Tytgat, Kristin (2014): „Brüssel – eine offiziell zweisprachige Stadt, die in der Realität aber vielsprachig ist.“→Brosch, Cyril /Fiedler, Sabine (2014, Hrsg.), *Interlinguistik im 21. Jahrhundert*. Beiträge der 23. Jahreskonferenz der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 29. November – 01. Dezember 2013 in Berlin. Interlinguistische Informationen, Beiheft 21. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 61-64.
- Tytgat, Kristin (2014): „Mehr Englisch im belgischen Hochschulraum? Neue Sprachanforderungen an die an Hochschulen beschäftigten Lehrer in Flandern.“ →Brosch, Cyril /Fiedler, Sabine (2014, Hrsg.), *Interlinguistik im 21. Jahrhundert*. Beiträge der 23. Jahreskonferenz der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 29. November – 01. Dezember 2013 in Berlin. Interlinguistische Informationen, Beiheft 21. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 65-68.
- Vlasov, Dimitri V. (2014): *Istorija primenenija Ĝesperanto v. Rossii: peĉat', radioveŝĉanije, perepiska, samizdat*. Moskva: Impeto, 404 p.
- Werner, Jan (2014): *Tvorba slov v esperantu. La vortfarado*. Brno: MSD, 164 p. (ĉehlingva)
- Wickström, Bengt-Arne (2014): „Nachhaltiges Überleben von Minderheitensprachen: eine Übersicht einiger Modelle.“→Jörg Dötsch (Hrsg., 2014), *Dogma und Evolution. Beiträge zum 60. Geburtstag von Dietmar Meyer*. Marburg: Metropolis-Verlag, 101-126.
- Wickström, Bengt-Arne (2014): “Indigenes, immigration, and integration: A welfare-economics approach to minority rights.”→ *A handbook of alternative theories of public economics*. Edited by Francesco Forte, Ram Mudambi, and Pietro Maria Navarra. Cheltenham: Edward Elgar. Chapter 10: 227–242.
- Yu, Jianchao (2014): “Rezonado pri neologismoj inter Tibor Sekelj kaj Laŭlum.”→*Literatura Foiro* 269: 143-148.
- Zilah, de Eugene (2014): “Refoje pri ‘ci’ “.→*La Gazeto*, 29 (2014), n-ro 173: 3-8.

Żelazny, Walter (2014): *Ludoviko Lazaro Zamenhof. Lia pensaro, sekvoj kaj konsideroj*. Białystok: Centro de Esploroj Zamenhofologiaj ĉe la Instituto de Sociologio de la Universitato en Bjalistoko, 188 p.

) Ĉiuj tekstoj, kiuj aperis antaŭ tiuj ĉi-tie markitaj (ĉ. 50 studoj) estis menciitaj en **IpI, n-roj 61-62, 64, 66, 71, 74 kaj 86.

4.8 Bibliografioj: „La Oficiala Gazeto Esperantista“ kaj artikolaro de UEA

Bernhard Pabst transformis sekureccele en la formatojn doc kaj pdf la materialojn troviĝantajn en „La Oficiala Gazeto Esperantista“, (1908-1922), kiun siatempe bibliografiis. „Unuiĝo Franca por Esperanto“: <http://arkivo.esperanto-france.org/eco/eco.htm>.

Vidu <http://www.ipernity.com/blog/bernardo/386649>

Li krome ordigis en tabelo la ĉ. 3800 bibliografiojn, registritajn de *Tom Arbo Høeg*, *Douglas Draper* kaj *Andrej Grigorjevskij* (http://www.uea.org/teko/katalogo_de_artikoloj).

Tiuj du dosieroj riceveblas ĉe: bernhard.pabst@gmx.de

5 Bibliotekoj

5.1 Brokantejoj en la reto

En jenaj retaj brokantejoj troviĝas i.a. esperantaj titoloj:

<http://www.abebooks.de/>

<http://www.marelibri.com/>

<http://www.antiquario.de/>

<http://www.zvab.com>

<https://secure.booklooker.de/>

Ĉu ekzistas pliaj, ankaŭ alilingvaj?

5.2 Prelegoj kaj honorigoj en Aalen nun en la reto

La prelegoj kaj honorigoj lige al la distingo de *Utho Maier* kaj *Karl Heinz Schaeffer* per la Esperanta Kulturpremio de Aalen, 29.3.2014 (vd. IpI 90, p.6) nun ankaŭ troviĝas en la reto. Ilin video-registris *Sebastian Kirf*. Ili troviĝas sub jenaj ligoj:

11:18 FAME 2014 #01 : Begrüßung am Festabend von Esperanto in Deutschland - Deutscher Esperanto-Bund e.V.

<http://www.youtube.com/watch?v=iFXkjGakIYQ>

„Esperanto (k)ein gelungenes Experiment? Einige Bemerkungen zu einer realen Utopie.“
(Prelego Detlev Blanke)

15:49 FAME 2014 #05 : Laudatio zur Preisverleihung durch Gerhard Walter von Esperanto in Deutschland - Deutscher Esperanto-Bund e.V.

7:14 FAME 2014 #09 : Grußworte von Sebastian Kirf von Esperanto in Deutschland - Deutscher Esperanto-Bund e.V.

2:46 FAME 2014 #11 : Abschließende Worte von Esperanto in Deutschland - Deutscher Esperanto-Bund e.V.

12:49 FAME 2014 #07 : Die Übergabe des Aalener Kulturpreises 2014 von Esperanto in Deutschland - Deutscher Esperanto-Bund e.V.

6 Historiistoj malkovras Esperanton

Ulrich Lins

La centa datreveno de la eksplodo de la Unua Mondmilito servis al politikistoj kaj verkistoj kiel okazo por konsciigi al ni, kion la monda socio ĝis 1914 atingis kaj poste katastrofe perdis. Tie ĉi ni menciis nur unu temaron: tiun de tutmondiĝo aŭ “globaliĝo”. Multaj libroj, kiuj aperis okaze de la datreveno, atentigas, ke tendencoj al tutmondiĝo floris jam antaŭ 1914.

En kelkaj el tiuj libroj ankaŭ Esperanto estas traktata. La lingvo ekzistis en 1914 eĉ ne tridek jarojn. El tiuj vere atentinda mi trovas la temon ekde 1900, kiam okaze de la “Ekspo” en Parizo Esperanto komencis allogi sciencistojn. La juna movado travivis kulminon en 1905, dum la Unua Kongreso en Bulonjo. Ke Esperanto tiutempe estis populara, mencias verkoj lastatempe aperintaj; ili metas ĝin en la kuntekston de la internaciismo disvastiĝanta en la jaroj antaŭ 1914 kaj kruele haltigita de la Unua Mondmilito.

Unu tia verko estas de la aŭstralia historiistino *Glenda Sluga, Internationalism in the Age of Nationalism* (Philadelphia: University of Pennsylvania Press, 2013), kiu por ilustrati la fortecon de la antaŭmilita internaciismo atentigas, ke en 1908 en la mondo ekzistis ĉirkaŭ 400 esperantistaj grupoj kaj 30 Esperanto-gazetoj; ŝi bone klarigas i.a. la signifan kontribuon de la aŭstra pacifisto kaj esperantisto *Alfred Hermann Fried*. La temon simile aliras la renoma usona historiisto *Mark Mazower: Governing the World: The History of an Idea* (New York: Penguin Press, 2012). Li laŭvorte citas kion li nomas “himno al internaciismo”, nome la faman kanton en la Zamenhofa Pra-Esperanto (“Malamikete de las nacjes”). Ĝuste per tiu citaĵo *The Guardian* (19-10-2012) enkondukas recenzon de la libro. Mazower akcentas, ke la pac-stimula celo de la kreinto de Esperanto “havis elstaran sencon en epoko de kreskanta naciismo – antaŭ ĉio por la judoj de orienta Eŭropo”.

Iom pli detala estas la prezento de alia usonano, la same konata historiistino *Emily S. Rosenberg*, kiu kontribuis per ampleksa eseo (“Transnational Currents in a Shrinking World”) al ampleksa volumo (redaktita de ŝi), *A World Connecting, 1870–1945*, kiu estas la kvina volumo de nova sesvoluma monda historio eldonita de Harvard-Universitato (2012). Rosenberg celas montri, kiel formiĝis transnaciaj ligoj jardekojn antaŭ ol „globaliĝo“ eniris uzon en la ordinara vivo. Laŭ ŝi, Esperanto estis por la unuaj transnaciaj reformantoj altira komunikilo; ĝi “helpis generi la ideologian framon de unumondismo”. Pro sia forta ligo kun internaciismo Esperanto akiris “altan kredindecon” en Ligo de Nacioj, kaj nur pro la sinteno de Francio vera sukceso ne estis atingita. Pri la dudekaj jaroj la aŭtorino aludas je la konflikto inter neŭtraluloj kaj socialistoj en la Esperanto-movado, sed poste emfazas, ke la movado kiel tuto estis atakata de naciistoj kaj ke Hitler kaj Stalin ambaŭ ligis ĝin “kun judoj kaj kun subfosaj fortoj”.

Simile kiel Sluga kaj Mazower, ankaŭ Rosenberg apartenigas Esperanton al la fiaskintaj provoj de internaciismo, estiĝintaj antaŭ la Unua Mondmilito. Dum ĉe Mazower ŝajnas, ke

Esperanto ne postvivis la Ido-skismon (li kontrastigas la noblajn celadojn de la mondlingvanoj kun ilia kverelemo), por Rosenberg la Esperanto-movado transvivis pli longe. Ŝia prezento donas la impreson, ke ĝi pereis, ĉar Hitler kaj Stalin ekstermis ĝin.

Ke en tiuj ĉi tri gravaj verkoj (tiuj de Mazower kaj Rosenberg estas jam tradukitaj en plurajn lingvojn) Esperanto trovis lokon, eble instigos al pli da esploroj. Fakte, jam komencis kreski la nombro de sciencaj studoj, kies temo estas specialaj aspektoj de la historio de Esperanto. En “kulturscienca manlibro pri la Dua Mondmilito” granda parto de unu kontribuaĵo temas pri planlingvaj ideoj komence de la jarcento, kun aparta emfazo al tiuj de *Wilhelm Ostwald* (kiu dum la milito transformiĝis en „anti-internaciiston“).⁴

La plej nova ĉi-tema doktoriĝa tezo estis defendita en la Universitato de Maastricht en junio 2014: *Fabian de Kloe, Constructing Worlds with Words: Science and International Language in the Early Twentieth Century*. Laŭ tiu aŭtoro, jam antaŭ la eksplodo de la Unua Mondmilito sciencistoj emis favori sian nacian lingvon (anglan, francan aŭ germanan) kontraŭ artefarita lingvo. Ke ni povas atendi pliajn tiajn studojn, supozigas raporto donita pri sekcio de la Kongreso de Germanaj Historiistoj en Mainz (2012). En tiu sekcio temis pri la taskoj por “transnacia historio de sociaj movadoj”; la raportanto admonas interalie, ke tiu, kiu volas adekvate esplori la historion de Esperanto, “devas scii almenaŭ du kromajn lingvojn”.⁵

La necesan lingvokonon sendube havas la du usonaj slavistoj, kiuj en novembro 2014 prezentis referaĵojn dum la jarkongreso de la usona Asocio por Slavaj, Orienteŭropaj kaj Eŭraziaj Studoj (ASEEES) en San Antonio, Teksaso.⁶ Unu sekcio tie estis dediĉita al alia grava datreveno: „25 jarojn post la falo de la Berlina Muro: Historiaj heredaĵoj kaj novaj komencoj”. Tiukadre aŭdiĝis referaĵoj de *Theodore R. Weeks* pri la klopodoj de polaj esperantistoj en la dudekaj jaroj harmoniigi internaciismon kaj polan patriotismon kaj de *Brigid O’Keefe* pri la frua sovetia movado kun aparta atento al la SAT-kongreso en Leningrado (1926).⁷

En alia sekcio *Paul Ariste* estis prezentita (de *David Ilmar Beecher*) kiel peranto, uzanta ankaŭ Esperanton, inter estonoj kaj rusoj. Se ni aldonas al tio la doktoriĝan tezon de *Ian*

⁴ Markus Krajewski, „Globalisierungsprojekte: Sprache, Dienste, Wissen“, en: Niels Werber k.a., ed., *Erster Weltkrieg. Kulturwissenschaftliches Handbuch*, Stuttgart kaj Weimar: J.B. Metzler, 2014, p. 51–84. –

Pli frue la sama aŭtoro publikigis: “Organizing a Global Idiom: Esperanto, Ido and the World Auxiliary Language Movement before the First World War”, en: W. Boyd Rayward, ed., *Information beyond Borders: International cultural exchange in the Belle Époque*, Farnham: Ashgate, 2014, p. 97–108. En tiu ĉi kolektiva verko estas ankaŭ kontribuaĵo de la supre menciita Fabian de Kloe.

⁵ <http://hsozkult.geschichte.hu-berlin.de/forum/id=2022&type=diskussionen>. La postulojn certe plenumas la polino *Agnieszka Jagodzińska*, kiu por sia studo pri Zamenhof kaj la juda demando (*Ludwik Zamenhof wobec "kwestii żydowskiej"*, Krakovo kaj Budapeŝto: Austeria, 2012) uzis interalie fontomaterialon en la rusa, jida, hebrea, pola kaj germana; krome la japandevena israelano Tsvi Sadan.

⁶ <http://www.aseees.org/convention/program>

⁷ Vd. ankaŭ <http://dissertationreviews.org/archives/5343>

Rapley pri la japana Esperanto-movado, submetitan en Oksfordo en 2013⁸, ni povas konkludi, ke la atento al Esperanto kreskas, ne en la vasta publiko, sed inter fakuloj – kaj ne unuavice inter lingvistoj, sed inter specialistoj, kiuj malkovras la politikan-idean signifon de la historio de Esperanto.⁹

7 Terminologio

7.1 Du stipendiuloj de UEA studis terminologion en Vieno

Aida Čižikaitė el Litovio kaj *Ariadna García Gutiérrez* el Kubo ĉi-printempe en konkurso de UEA gajnis subvencion por vojaĝo al Vieno kaj partopreno en la terminologia somerlernejo, kiun la internacia terminologia reto TermNet okazigis de la 14-a ĝis la 18-a de julio 2014. Reveninte de Aŭstrio ili rakontas pri siaj spertoj.

"Mi ne povis imagi kiel profunda interrilatiĝo ekzistas inter mia studfako kaj Terminologio [...] mi nun havas pli konkretan bildon pri kiel prepari terminologian projekton", asertas Ariadna García Gutiérrez.

"Dankon al UEA kaj TEC – sen ilia financa subteno neniamaniere mi havus eblon partopreni", raportas Aida Čižikaitė.

La raportoj de la du stipendiuloj nun legeblas en la biblioteko de la Terminologia Esperanto-Centro (TEC): <http://esperanto.net/tec/biblioteko.html>

Mélanie Maradan, komisiito de UEA pri terminologiaj instancoj kaj organizinto de la ĉi-jara konkurso, intencas starigi similan stipendi-eblon en 2016 por kapabli pli da esperantistoj pri la terminologia fako.

7.2 Kristana Glosaro Germana – Esperanto de *Bernhard Eichkorn*

Eichkorn, Bernhard (1934-) [[W](#)]. Christliches Glossar Deutsch – Esperanto. Kristana Glosaro Germana - Esperanto. — Nur [rete](#) konsultebla. En Dec. 2014 ankoraŭ daŭrigata. [Ekran-foto](#). Alfabete ordigita laŭ la germanaj terminoj katolikaj kaj evangeliaj. Ampleksas en 12-punkta skribo ĉ. 950 p. A4. Memprezento:

„Mia Kristana Terminaro celas registri laŭeble multajn vortojn pri kristana vivo (ankaŭ pri ordena vivo, eklezia muziko, kristana arto kaj literaturo) kaj teologio (kredo-doktrino, moralo, liturgio, eklezia historio, Biblio, eklezia juro) k.s. Ĝi koncize klarigu ilin, sed nek estu vortaro kun gramatikaj indikoj, nek leksikono kun ampleksaj fonaj informoj. Mi ĝenerale ne registros nomojn (personajn aŭ geografiajn), ĉar ili transpaŝos la taskon.“

[Pri la glosaro informas Bernhard Pabst:](#)

⁸ *Green Star Japan: Internationalism and Language in the Japanese Esperanto Movement, 1906-1944.*

⁹ Pasintjare aperis studo pri grava pioniro de la informa scienco: Thomas Hapke, “Julius Hanauer: Bio-Bibliographical Traces of a German Special Librarian, Esperantist, and Documentalist“, en: *Library Trends*, vol. 62, 2013, n-ro 2, p. 346–359. La nazioj deportis Hanauer en 1941 de Frankfurto al Lodzo, kie li mortis (19-4-1942). Post la milito li estis komplete forgesita en „Esperantujo“.

2009: Bernardo [t.e. Bernhard Pabst]. Eichkorn: Ambicia Kristana Terminaro. En: [Ipernity](#) (2009-07-21).

8 Leksikografio

8.1 Grava vortaro de *Gaston Waringhien* en la reto

La konata vortaro Esperanto-franca de Waringhien el 1957 kun ĉiuj postaj aktualigoj nun estas rete konsultebla:

1957 Waringhien, G[aston]. Grand dictionnaire Espéranto-Français. Paris: Librairie Centrale Espérantiste, 1957. 368 p. — pr. Brodard-Taupin, Coulommiers. 20x14 cm. ĉ. 44.000 kapvortoj.

2a eld. avec Supplément. Paris: SAT-Amikaro, 1976. — pr. Imp. “Les Editions Polyglottes”, Paris. 367, 16 p. — 20x14 cm.

3a rev. eld. prizorgita de Albault, André; Signoret, Paul. Paris: SAT-Amikaro, 1994. 443 p. — 30x14 cm. bind. Inkl. de propraj nomoj.

Internet-versio de Aprilo 2014 konsultebla je
<http://esperilo.be/publications/sat/waringh.htm> kaj
<http://myspace.voo.be/glemaitr/sa>

8.2 Granda Vortaro Esperanto-Ĉeĥa de *Josef Hron*

GVEĈ 2006 certe estas rimarkinda vortaro de [Josef Hron](#). Laŭ sia [enkonduko](#) ĝi estas "nuntempe en la mondo la plej granda Esperanta traduka vortaro". Versio 7 enhavas "pli ol 210 000 vortojn", t.e. esperantaj radikoj kaj kunmetaĵoj tradukitaj al la ĉeĥa. Ĝi estas senkoste [elŝutebla](#) kiel Excel-dosiero de 49 megabajtoj. Ĝia esperanta parto povas servi – tiel la aŭtoro – ankaŭ kiel bazo de aliaj vortaroj de la tipo eo-xy, anstataŭigante la ĉeĥan per alia lingvo. Ni do iom rigardu ĝin ...

[http://www.ipernity.com/blog/bernardo/201691,\(22.3.14\)](http://www.ipernity.com/blog/bernardo/201691,(22.3.14))

Bernhard Pabst

9 La Esperanto-Vikipedio sur DVD: pli ol 200 000 artikoloj

En aŭtuno 2014 E@I publikigis rimarkindan DVD. Ĝi entenas ĉiujn artikolojn de la esperanta eldono de Wikipedia (Vikipedio), nome 204 259 artikolojn je la 27-a de oktobro 2014: http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Bonvenon_al_Vikipedio.

La enhavo de la DVD ne nur konsulteblas per komputilo sed ankaŭ ebligas rektan ligon al la reto, kaj tiel al la aktualaj eldonoj de la diverslingvaj Vikipedioj.

La DVD mendeblas ĉe la eldonejo Espero, Partizanské (SK), www.ikso.net aŭ ĉe UEA.

10 Forpasis

10.1 *Oleg Iljiĉ Krasnikov* (1937-2014)

La 16-an de junio 2014 post mallonga malsano en Kirova malsanulejo forpasis *Oleg Iljiĉ Krasnikov*.

Oleg Krasnikov naskiĝis la 11-an de junio 1937. Li lernis Esperanton unue en 1955 estante studento de la Urala Politeknika Instituto en Sverdlovsk (nun Ekaterinburgo), sed posedis ĝin nur en 1970.

En la 1980-aj jaroj Krasnikov instruis Esperanton en la Esperanto-klubo "Antaŭen".

Oleg Krasnikov kaj *Detlev Blanke* estas aŭtoroj de la ruslingva historia verko "Esperanto-movado: fragmentoj de la historio", eldonita de la moskva eldonejo "Impeto" en 2008. Krasnikov surbaze de multjaraj esploroj verkis la parton "Historio de Sovetrespublikara Esperantista Unio" (Blanke pri la laborista Esperanto-movado; tradukis *Anatolo Sidorov*).

Oleg Krasnikov ankaŭ estas kunaŭtoro de la kolektiva ruslingva verko "Esperanto-movado en norda-okcidenta eŭropa parto de Ruslando", eldonita de la petersburga eldonejo "Skifija" en 2014. Al la plumo de Krasnikov apartenas studoj pri la historio de la Esperanto-movado en la urboj Kirov (eksa Vjatka) en la 1920-30-aj jaroj, la Esperanto-movado en Jaransko, Sovetsko, Omutninsko. Entute en la laste menciita libro al la esploroj de O.Krasnikov estas dediĉitaj 23 paĝoj (de la 39-a ĝis la 62-a).

Laŭ la deziro de la mortinto liaj Esperanto-arkivo kaj -biblioteko estis donacitaj al la petersburgaj esperantistoj. Jen la precizaj bibliografiaj informoj pri la menciitaj verkoj:

Oleg Krasnikov/Detlev Blanke (2008): *Esperanto-dviĝenie: fragmenty istorii*. (La Esperanto-movado: Historia Fragmentoj). Moskva: Impeto, 214 p.

Sidorov, Anatoli V. (2014, red.): *Ĝesperanto-dviĝenie na Severo-Zapade Rossii*. Sankt-Peterburg: Sidorov, 160 p. (La Esperanto-movado en nord-okcidenta eŭropa parto de Rusio).

(Laŭ *Anatolo Sidorov*)

10.2 La volapükisto *Arie de Jong* (1924 – 2014)

Reinhard Haupenthal

Kun bedaŭro mi informas, ke *D-ro med. Arie de Jong* forpasis en la aĝo de 90 jaroj en Nijmegen (NL) la 24an de aprilo 2014. Li estis la filo de la sam-noma *D-ro Arie de Jong* (1865-1957), kiu de la 1920aj jaroj engaĝiĝis por revivigo de Volapük. Li publikigis lernolibrojn kaj vortarojn, tradukis la Novan Testamenton kaj eldonis la revuon *Volapükged* pro nedanapükans.

Okaze de vizito en Saarbrücken en la 1980aj jaroj kaj okaze de vizitoj ĉe li en Nederlando *D-ro de Jong* donacis al mi la Volapük-kolekton de sia patro (biblioteko kaj arkivo) kiel ankaŭ la Volapük-postlasaĵon de *Johann Krüger* en Amsterdam. Tiel kaj per la transpreno de partoj de la biblioteko de *Johann Schmidt* (1895-1977) mi disponas pri unu el la tut-monde plej grandaj Volapük-kolektoj, kiu nun estas parto de la "Planlingva Kolekto Haupenthal" en Bavara Ŝtata Biblioteko.

La arkivo de *D-ro Arie de Jong* (la patro) ampleksas ties korespondon de la 1890aj jaroj ĝis lia morto en 1957 (i.a. kun *Johann Martin Schleyer*, *Johann Schmidt*, *Jakob Sprenger* kaj *Prof. Dr. Albert Sleumer*). Scienca valorigo de ĉi korespondo restas la tasko de la interesitata postmondo.

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantic.org. ISSN 1385-2191. **Redaktas:** Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 6 33, fakso:+ 49-30-54 98 16 38, detlev@blanke-info.de. **Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retpoŝto aŭ KD. Artikoloj sen aparta indiko pri aŭtoreco kutime estas kompilitaj de la redaktoro. Represo kun fontindiko estas permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Oni ĉefe bibliografias viditajn materialojn. Kunlaborantoj el ĉiuj mondaj regionoj bonvenaj. IpI riceveblas laŭpete senpage de CO de UEA .**
